

Revuo de Kanada Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Societo Kebekia

2025: 3-4 | ISSN: 0827-3154



“Himalia”: nova kanada profesia filmo en Esperanto!

De la redakcio

Karaj legantoj, jen venis mia tempo kiel redaktoro de *Lumo* ĝisrevidi vin. Mi redaktis *Lumon* dum ses jaroj (2020-2025) kaj antaŭ tio, *La Riveregon*, de Esperanto-Societo Kebekia, de 2010 ĝis 2020. Mi foriras kun la sento de enorma dankemo al ĉiuj, kiuj helpis kaj subtenis min en tiu laboro, ne ĉiam facila, kaj kiuj kontribuis al nia bela revuo. Antaŭ ĉio, mi dankas al niaj fidelaj provlegistoj: Bob Williamson, Silvano Auclair, Francisko Lorrain, Trefleo Mercier kaj ĉiuj aliaj, kiuj helpis. Mi sentas samtempe iometan nostalgion kaj grandegan malpeziĝon transdonante la redaktoran torĉon al mia kara amiko kaj komplico en pluraj projektoj — Garry Evans, konata al la mondo ankaŭ kiel “s-ro Mann”, pro lia aktorado en la teatraĵo “1910”.

Garry estas ne nur mult-talenta kaj afabla, sed ankaŭ brava. Li ne timas ensalti en projektojn kaj doni al ili sian tutan amon, ĉu temas pri prezidanteco de KEA, aktorado en teatraĵo kaj nun redaktado de *Lumo*. Mi elkore bondeziras kaj kuraĝigas lin en tiu laboro.

La ŝanĝiĝo de la redaktoro signifas ŝanĝiĝon enhavan, aspektan, sentan, kaj tio estas bona afero. Tio estas bona afero, ĉar nia Movado ĝenerale bezonas renovigon kaj reelpenson de si mem. Mia redakta aliro estis multe influita de

mia laboro kiel redaktoro de *Kontakto*. Do, *Lumo* de la tempo de Ĵenja Amis prenis la aspekton de socikultura revuo, iom kiel *Kontakto* aŭ *Monato*, kun profunda esploro de iu temo, literaturaj partoj, pluraj fotoj, ktp. Dum la enhavo ĉiam pli ampleksiĝis (aparte kiam la reta formato permesis aldonon de paĝoj), mi ne povis ne demandi min, ĉu nia asocia revuo bezonas esti tiom ambicia kaj ampleksa. Mi verdire neniam trovis bonan respondon al tiu demando... Nu, *Lumo* sub mia redakto spegulis mian propran personecon kaj interesojn, kaj *Lumo* de Garry Evans spegulos lian personecon kaj aliron!

En la antaŭinterreta epoko la respondo estis simpla: informi membrojn. Nun membroj informiĝas per la retaj fontoj kaj niaj asociaj novaĵbultenoj: *RiveReto* (Kebekie) kaj *Lumeto* (Kanade), dank’ al la laboro de iliaj brilaj redaktoroj: Silvano Auclair kaj Bob Williamson. Pro tio multaj asociaj revuoj en la lastaj jaroj malaperis aŭ transformiĝis (ekz., *La Riverego* de ESK, kiun anstataŭigis *Lumo* en 2020), sed aliaj persistas kaj kelkaj prosperas. Ekzemple, la revuo de nia najbara asocio — Esperanto-USA eĉ (re) transiris de la reta formo al la formo de printita eldonaĵo. Tio pensigas min pri tio, kia estu nia *Lumo* nun kaj estontece. Kion vi pensas pri la bulteno? Kion vi ŝatas legi — aŭ malŝatas legi en ĝi? Kian formaton vi mem preferas? Dividu viajn

pensojn kun Garry kaj, plej grave, sendu viajn kontribuojn!

Mi diru kelkajn vortojn pri la jaro 2025. Dum ni spektis la falon de la “plej granda demokratio en la mondo” (legu pli en la antaŭa numero de *Lumo*: kun la temo “Kio diable okazas en Usono”), ni agis per la sola bona maniero: per amikeco kaj kunlaboro. Ni organizis, kun niaj najbaroj el Usono, la Dulandan Kongreson en Toronto. Ĝi sukcesegis, kaj estis jen plia pruvo de tio, ke pli bona mondo eblas... Mi estas fiera pri tiu evento kaj, plej grave, pri la kunlaboro de la du asocioj. Mi volas pensi, ke Zamenhof ankaŭ estus fiera...

Por mi, la Toronta Dulanda Kongreso sentiĝis preskaŭ kiel UK: ĝi eĉ havis antaŭkongreson kaj postkongreson, ne parolante pri diversaj tagaj ekskursoj. Ni danku torontanojn ne nur pro ilia organiza laboro, sed ankaŭ eksterordinara gastamo! Mi mem kiel organizanto de la arta vespero estas dankema pro tiom da belaj kontribuoj de kanadanoj kaj usonanoj! Mia laboro

kunmeti la artan vesperon estis facila kaj ĝuinda, dank’ al ĉiuj viaj talentoj!

Aparte ĝojigis min la partopreno en la Dulanda Kongreso de du karaj amikoj: Ilia Dewi el Indonezio kaj Jérémie Sabiyumva el Burundo. Ili devis veni por la Montreala UK en 2022, sed, bedaŭrinde, la kanada registaro donis al ili vizojn

jaron post la UK... Nu, almenaŭ ĝustatempe por la Toronta Dulanda Kongreso tri jarojn poste!

La ĉefa temo de tiu ĉi numero estas Esperanto kaj kinoarto. Vi trovos, interalie, artikolojn pri Esperanto kaj Holivudo, pri la ikona filmo “Najbaroj” de McLaren (kiu ricevis Oskaron!), kaj, plej grave, la intervjuon kun la filmfaristoj

de *Himalia*, nova kanada profesia filmo en Esperanto, pri kiu laboris multaj ESK-anoj. Laste sed ne balaste, ni ankaŭ memoru kaj estu fieraj, ke unu el ni, Esperanto-parolanto Matthew Rankin, reprezentis Kanadon por Oskaroj en frua 2025 kun la fimo *Universal Language*.

Bonan legadon — kaj multajn lumjarojn al nia *Lumo*!



Raporto de la Prezidanto: 2025

Garry Evans

Estas mia devo – kaj ankaŭ plezuro – prezenti mallongan raporton pri la stato kaj agadoj de la Asocio dum la pasinta jaro.

KEA estas malgranda, sed sufiĉe vigla asocio. Ni havas iom pli ol cent membrojn. Kompare kun nia najbara asocio en Usono – kiu havas proksimume kvincent membrojn – nia membraro estas proporcie pli granda rilate al la loĝantaro de nia lando.

Kiuj estis niaj plej sukcesaj agadoj ĉi-jare? Mi ne hezitas mencii la Dulandan Kongreson, okazintan en Toronto en julio, kun ĉirkaŭ 120 partoprenantoj. Bedaŭrinde, pro familia malsano mi mem ne povis ĉeesti. Tamen, multaj partoprenintoj raportis, ke ĝi estis ege ĝuinda evento, kun riĉa arta programo kaj tre amika etoso. En la nuna epoko, kiam la rilatoj inter Kanado kaj Usono ne estas same glataj kiel antaŭe, estas des pli grave ke ni, Esperantistoj, daŭrigu la reciprokan kontakton. La organizado de la kongreso estis elstara. Mi volas



kore danki la tutan LKK-on, kaj aparte ĝian prezidanton Jed Meltzer, la kasiston Jeremy Bass, James Mackey kaj Luis Obando.

Daŭrigante pri niaj rilatoj kun Usono, mi volas mencii la printempan numeron de *Lumo*, la

komuna revuo de KEA kaj de la Esperanta Societo Kebekia (ESK), kiu aperas dufoje jare kaj estas brile redaktata de Ĵenja Amis. Tiu numero estis aparte ampleksa kaj bunta, kun kontribuoj de usonaj Esperantistoj pri la temo “Kio diable okazas en Usono?”.

Krom *Lumo*, nia nova monata novaĵletero *Lumeto* regule aperas dank’ al la diligenta laboro de Bob

Williamson. Ĝi estas utila ilo por atentigi la membraron pri venontaj eventoj en Esperantujo, precipe en Kanado.

Eble la plej grava regula evento de KEA estas la Kanada Virtuala Kongreso (KVak). La novembro KVak estis aparte enhaviĉa, kun la temo “Filmoj”. Ni montris (la unuan fojon rete ie ajn) la

Esperanto-lingvan kanadan filmon “Himalia”, kiun sekvis demandoj al unu el la filmfaristinoj. Alex Miller ankaŭ parolis pri la “Usona Bona Film-festivalo” kaj ni montris du el la plej aprezataj filmoj de la ĉi-jara festivalo.


KVaK (*vidu la fotojn*) kutime okazas du fojojn jare, printempe kaj aŭtune. Printempe ĉi-jare ĝi ne okazis, ĉar ni anstataŭe organizis RBK-on – Renkontiĝon inter Brazilo kaj Kanado – kiu poste transformiĝis en VARIE (Virtuala Amerika Renkontiĝo Inter Esperantistoj). Ni decidis inviti ĉiujn Esperantistojn el Ameriko (kaj fakte el la tuta mondo) al interesa programo kaj libera babilado. Kanado gvidis la unuan VARIE-renkontiĝon en majo; poste Brazilo kaj Usono viciĝis organizi ĝin. La sekva VARIE okazos la 16-an de januaro je la 19:00 horo laŭ la orienta horzono, ĉi-foje gvidata de

Kolombio. Mi varme invitas vin partopreni.

Mi volas ankaŭ reliefigi nian bibliotekon, lerte administratan de Martin Morris, profesia bibliotekisto. Ĝi enhavas ĉirkaŭ 1 500 librojn, inter kiuj multaj estas malfacile alireblaj aliloke. Membroj de KEA kaj ESK rajtas prunti librojn, kiujn la biblioteko sendas al vi senpage; vi nur kovras la kostojn de resendo. Se vi ŝatas legi, certe, utiligu ĉi tiun riĉan rimedon.

Dum la jaro ni ankaŭ renovigis la statuton de KEA. Ni modernigis ĝin (ekzemple, ne plu necesas sendi formalan avizon al la membraro per helika poŝto). Estas ĝuste danke al la nova statuto ke ni okazigis la jarkunvenon

rete, kiu laŭ la kanada juro estas deviga. Mi dankas Geoffrey Greatrex pro la ĉefa laboro pri la revizio, kaj Trefleo Mercier pro la traduko al la angla kaj franca.



Honoraj gastoj de KVAK: Clara Milo (kunfarintino de *Himalia*) kaj Alekso Miller

Mi devas ankaŭ danki la tutan estraron pro ĝia diligenta laboro. Ni kunvenas ĉiumonate por diskuti kiel progresigi la Asocion kaj antaŭenigi Esperanton en Kanado. Aparte menciindas la kontribuoj de Bob Williamson (sekretario), Jordan Zero (kasisto kaj respondeculo pri la retejo kaj sociaj retoj), Ĵenja Amis kaj Geoffrey Greatrex. Ekster la estraro, mi volas aparte aprezi la multflankan laboron de Andy Blair, kiu tre subtenas la lokajn klubojn tra Kanado. La deĵorperiodo de la nuna estraro finiĝos ĉe la



fino de la jaro. Mi demisios kiel prezidanto, sed mi tre ĝojas ke Geoffrey akceptis ree kandidati por la prezidanteco dum la venontaj du jaroj. John Huang el Toronto eniros la estraron, kaj ĉiuj aliaj estraranoj – krom Raymond Brisebois – plu servos. Mi volas speciale danki Rajmondon, kiu agis kiel kasisto dum pli ol dek jaroj. Mi mem transprenos la respondecon pri *Lumo*. Ĵenja, mi ĝojas diri, restos en la estraro, kvankam sen specifa ofico; ŝiaj ideoj kaj komentoj ĉiam estas tre valoraj.

De la nova prezidanto de KEA

Mi deziras al ĉiuj anoj de KEA feliĉan kaj fruktodonan novan jaron – kiel mi deziras la samon al nia asocio! Ni havas spertan kaj kompetentan teamon, kiu jam dum jaroj (eĉ jardekoj plurkaze) agadas por nia afero; samtempe ni bonvenigas nian novan anon, John Huang, kiu plurflanke aktivas en la Movado. Ni ĉiuj strebos antaŭenigi nian lingvon en Kanado dum la venontaj du jaroj. Ne mankas ideoj pri kion ni faru – sed ja mankas tempo kaj (aparte)

homforto. Necesas renovigo en nia asocio: ĝenerale ne estas tiom bona signo, kiam antaŭa prezidanto denove revenas al sia antaŭa rolo, ĉar (kiel en nia kazo) tio estas indiko de manko de kandidatoj. (Tiu senkulpigo ne funkcias sude de la kanada landlimo, evidente). Mi do volas substreki super ĉio nian bezonon de novaj (kaj junaj) aktivuloj en nia lando. Se vi volas ludi rolon en la asocio (ne nepre kiel estrarano), ne hezitu nin kontakti: ĉia helpo estos bonvena.

Dankon pro via atento.

Geoffrey Greatrex, prezidanto de KEA, 2026-2027

“Troplanu!”

Kiel organizi *perfektan* kongreson!

James Mackey estas, sendube, “leviĝanta stelo” de la Kanada Movado. Li estis unu el la organizantoj kaj la ĉefa motoro malantaŭ la Dulanda Kongreso en Toronto (julio 2025).

Por la kongesanoj, li ŝajnis ĉionfaranta, ĉiam, ĉie, kun afablaj vortoj kaj la kapablo kvazaŭ-magie respondi ĉiun demandon, solvi ĉiun problemon kaj helpi laŭbezzone. Kiel organizanto de la arta vespero Ĵenja Amis (la intervjuinto) aparte aprezis lian helpon kiel entuziasma anoncisto de la vesperaj talentuloj. Do renkontu James – kaj lernu pri liaj spertoj kiel organizanto de la mirinda Dulanda Kongreso en Toronto.

Rakontu iomete pri vi kaj kiel (kaj kiam) vi esperantistiĝis! Kio portis vin al la Movado?

Verdire, mi ne memoras! Mi certas ke mi eklernis per Lernu.net iam dum 2019, sed ial ĉesis. Kiam okazis la pandemio, mi subite havis multe da tempo, sufiĉe por reeklerni. Poste, mi eksciis ke estas okazonta Universala Kongreso en Montrealo, je tre proksima distanco de Toronto! Mi dediĉis min al studado dum jaro, kaj partoprenis la Montrealan UK-on. Estis magia, neforgesebla sperto.

Fakte, mi estis parolinta Esperanton kun aliaj homoj nur du fojojn antaŭ la kongreso — unu

fojon ĉe virtuala renkontiĝo, kaj duan ĉe vespermanĝo tuj antaŭ la kongreso. Ne necesas diri, ke mia esperanto pliboniĝegis tiun semajnon!

Kiel vi enplektiĝis en la organizado de DLK-NASK en Toronto kaj kiu estis via rolo – aŭ pli ekzakte, viaj roloj – kaj la roloj de aliaj organizantoj?

En aprilo de 2024, vizitis Toronton Brandon Sowers, prezidanto de Esperanto-USA. Mi ĉeestis la ĉiumonatan renkontiĝon kun li, kie li proponis al ni la ideon starigi kongreson en Toronto. Iom post iom, ni kontentiĝis pri la ideo, kaj finfine konsentis.

Mi nepre emfazu kiom granda estis la tasko organizi la kongreson, kaj kiom malmulte mi fakte faris! Se mi ŝajnis “ĉionfaranta”, temas nur pri la “tutageco” de miaj taskoj: mi kun-organizis la programon, starigis teĥnikaĵojn, kaj gvidis la prelegantojn, t.e., miaj plej gravaj taskoj okazis dum la kongreso mem. Alie, mi protokolis la LKK-kunsidojn, kunordigis la prelegantojn, kaj vizitis kelkajn ejojn nome de la netorontanaj organizantoj. Multe pli gravaj estis la negocado de la kongreseja kontrakto (Jeremio Bass), la kunordigado de la ĉambroj (Chuck Mays), la kongresa bazaro (Andy Blair kaj Amanda Schmidt), la retejo (Ĝordano Zero), kaj pliaj taskoj prizorgitaj de la menciitaj organizantoj kaj aliaj.

Rakontu pri viaj spertoj kiel kongresorganizanto! Kion vi trovis plej ĝuinda kaj kion plej malfacila? Ĉu vi mem sukcesis almenaŭ iom ĝui la kongreson? Kiel vi vidas la eventon de via flanko kiel organizanto?

Mi plej fieras pri la teĥnikaĵoj. Mi iom spertas pri



teĥnikaj (t.e., aŭdvidilaj) aferoj, eĉ se mi ne estas profesia teĥnikisto. Miaj kunorganizintoj povus atesti je la nombro de kalkultabeloj kiujn mi kreis, kontrolante ĉion pri la programeroj, ĉies teĥnikaj bezonoj, kiujn teĥnikaĵojn ni devis mendi, en kiuj

ĉambroj kiuj teĥnikaĵoj estis situontaj, kiel munti ilin, kaj kiuj volontuloj zorgos pri kiuj ĉambroj. Mi eĉ kreis gvidilon por klarigi kiel munti la sonsistemon (esperante kaj anglalingve — tiu ĉi temo estas tre komplika eĉ en Esperanto!) kaj provizis kopiojn por ĉiu ĉambro. La rezulto: ĉio iris glate, preskaŭ sen netrakteblaj problemoj. Por tiuj problemoj kiuj aperis, mi estis jam preparinta solvon. Mi nun danku Derek Roff de Nov-Meksiko, kaj Alekso Miller de Georgio, kiuj

ambaŭ restis ĝis la 23-a, la unua tago de la kongreso, por helpi min remunti la teĥnikaĵojn de la plej granda ĉambro. Tiun vesperon, ni trovis ke la projekciiloj estis nesufiĉe fortaj, kaj devis re-organizi la ĉambron por uzi pli fortan projekciilon. Dank' al ili, neniuj problemoj entrudiĝis en la programerojn de la venonta tago.

La avantaĝo kiam oni planas programon kaj, precipe, la volontulan kalendaron, estas ke oni povas mem elekti kiujn programerojn oni prizorgos, inter oniaj plej ŝatataj! Mi povis certigi mian ĉeeston ĉe paneldiskutoj, prelegoj, kaj filmoj preskaŭ laŭguste. Des pli, kiel senripozemulo, mi volas ĉien marŝi kaj ĉion vidi, do tiel ĉi mi povis kapti erojn de multaj programeroj samtempe. Mi sukcesis alparoli preskaŭ ĉiun kongresanon almenaŭ unufoje. Sentinte la kongreson ne nur kompletita, sed sukcesa, mi tiel ĝuis la kongreson.

Mi aŭdis de pluraj personoj – kaj mi mem konsentas – ke tio kion vi faris en Toronto estis fakte UK-nivela, kun antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj, la kongresa balo (eĉ senpaga) kaj mirinda programo. Do mi gratulas vin kaj ĉiujn organizantojn kaj helpantojn. Bravuloj, kaj bele

farite! Ĉu vi havas konsilojn por aliaj organizantoj de landaj / dulandaj kongresoj?

Dankon pro la afablaj vortoj!



Mia plej grava konsilo estas ke oni ne timu kalkultabelojn. Konstantaj, nevariantaj kolumnoj, en kiuj la transakcioj akordas rilate partoprenantojn, ĉambrojn, horojn, ktp, rapide diskonigos erarojn. Aldone, troplanu. Preparu la planon A, B, C, Ĉ, kaj kiom da aliaj formoj necesas. Mi sentis min tro zorgema, timante ke mi malŝparis monon kaj tempon preparante kontraŭ neokazontaĵoj. Sed finfine mi uzis preskaŭ ĉiujn rimedojn. Pliaj kabloj. Sekcioj en la gvidilo pri eblaj ontaj problemoj. Pliaj horoj en la ĉambroj por muntado / malmuntado. Aldona tekkomputilo — ne, du! Ĉion

mi uzis, kaj dankas la estintan min pro ties “troa zorgemo”.



NASK kaj Dulanda Kongreso en Toronto:

Riĉiga sperto!

Ilia Sumilfia Dewi, Indonezio

La 2-an de julio 2025 mi flugis al Toronto, Kanado, por partopreni du Esperantajn aranĝojn — la Nordamerikan Somerkursaron (NASK) kaj la Dulandan Kongreson (DLK), kiuj estis organizitaj de Esperanto-USA kaj la Kanada Esperanto-Asocio.

Tiu ĉi vojaĝo estis por mi la plej longa, daŭrante preskaŭ 24 horojn. Kvankam mi sentis min tre laca post la alveno, mia laceco rapide malaperis pro la varma bonvenigo de loka esperantisto, s-ro John Huang, kiu afable gastigis min ĉe sia hejmo. Lia afableco tuj donis al mi la senton, ke mi estas inter amikoj, eĉ antaŭ ol la aranĝoj komenciĝis.

La NASK 2025 okazis de la 5-a ĝis la 11-a de julio 2025 ĉe la *Toronto Metropolitan University*, en la koro de la urbo. La kursoj estis dividitaj en tri nivelojn: komencinta, progresanta, kaj sperta. Mi mem aliĝis al la sperta nivelo, gvidata de Jorge

Rafael Nogueras (Rafa), kies kurso temis pri verkado, precipe pri la arto krei mikronovelojn.

Dum ses tagoj, Rafa ne nur instruis la teknikojn de mallonga prozo, sed ankaŭ kuraĝigis nin eksperimenti per diversaj metodoj de verkado. Ni lernis kiel per kelkaj precizaj vortoj eblas krei fortan etoson aŭ neatenditan finon, kaj kiel observi ĉiutagajn situaciojn por trovi inspirojn. La kurso estis samtempe amuza kaj profunda, kun abundo da praktikaj ekzercoj kaj fruktodonaj diskutoj. Mi tre ĝuis la lecionojn kaj sentis, ke mia kapablo esprimi min en Esperanto pliriĉiĝis.



Krom la kursoj, la programo de NASK ofertis diversajn flankajn agadojn: prelegoj, filmprojekcioj, amuzaj ludoj, ekskursoj, kaj agrabla babilado kun amikoj en la ekstera kafejo. Laejo kaj la tranoktejo troviĝis en la sama konstruaĵo kiu estis konvena, komforta kaj proksima al la urbocentro, kio donis oportunan aliron al la

multaj vidindaĵoj de Toronto.

Post la fino de NASK tuj sekvis la Dulanda Kongreso (DLK) inter la 11-a kaj la 14-a de julio. Mi estis honorata esti unu el la invititaj honoraj gastoj, kaj kontribuis prelegon pri la tradicia ŝtofo Ulos el norda Sumatro. Dum unu kaj duono da horo mi prezentis diversajn tipojn de Ulos kaj klarigis ĝian kulturan signifon en la tradiciaj ceremonioj de la Batak-Toba popolo. La partoprenantoj montris grandan intereson pri la temo kaj faris multajn demandojn pri la simbolismo kaj la rolo de Ulos en la komunuma vivo. Mi ankaŭ iris al aliaj prelegoj kiuj kaptis mian intereson pri movado, podkasto de Usone Persone, prezento pri dokumenta filmo de Alekso

Miller, “Esplorante 1910”, kaj tiel plu. Dum la Internacia Vespero, mi havis la ĝojon kanti Esperantan kanton kaj danci tradicion indonezian dancon, vestita per tradicia kostumo el mia regiono. Aliaj kongresanoj ankaŭ kontribuis belajn artajn prezentaĵojn, kiuj riĉigis la vesperon kaj montris la diversecon de nia movado. La tuta programo okazis en etoso de sincera amikeco kaj interkultura respekto. Mi sentas profunde dankema pro la ŝanco partopreni en ambaŭ eventoj. Ili donis al mi ne nur valorajn spertojn pri la lingvo kaj kulturo, sed ankaŭ novajn amikecojn kun esperantistoj el la tuta kontinento. Tiuj tagoj en Toronto fariĝis unu el la plej belaj momentoj de mia jaro.



Katalin Kovács kaj Andy Blair



Honoraj invititoj de la kongreso

NASK kaj Dulanda Kongreso en Toronto:

Mia unua fojo en Kanado!

Jérémie Sabiyumva

Mi delonge havis revon viziti Kanadon, sed mi ne sciis en kiu kadro mi sukcesos konkretigi tiun revon. En 2022, post la pandemio, UK okazis en Montrealo. Tiam mi pensis, ke estas perfekta momento vojaĝi al Ameriko, kontinento kiun mi neniam vizitis. Mi do aliĝis al la kongreso, ricevis invitleteron kaj kandidatigis por vizo. Tamen, reago al mia vizopeto venis nur la venontan jaron, en majo 2023, kun jesa respondo. En 2025 prezentiĝis bona okazo uzi mian vizon, kadre de NASK kaj la Dulanda Kongreso de Esperanto.

En 2023, mi renkontis kanadajn esperantistojn en Torino, kaj babilis kun ili pri diversaj aferoj. Ili rakontis al mi multon pri Kanado; kaj tio vekis mian emon viziti ĉi landon. Post la kongreso, mi restis en kontakto kun kelkaj amikoj, kaj kunlaboris kun ili pri diversaj aferoj. En 2024, mi renkontis John Huang en Tanzanio, kaj ni denove havis interesajn

diskutojn, kaj tiam li parolis al mi pri la Dulanda Kongreso.

Amerikaj kongresoj estis multe konataj de mi, ĉar mi plurfoje legadis pri ili. Tamen, ili estis finance ne alireblaj, kaj mi ne havis ideon pri kiel mi sukcesos partopreni. En aprilo 2025 mi kontaktis organizantojn kaj informis, ke mi ŝatus partopreni, sed miaj financoj ne sufiĉos, kaj, surprize, organizantoj estis tre helpemaj kaj eĉ parolis al mi pri subvencio. Mi petis subvencion, kaj, feliĉe, mi ricevis ĝin kaj estis unu el la honoraj gastoj de la kongreso. Estis por mi granda honoro, esti konsiderita kiel honora gasto.

Bedaŭrinde, mi ne povis partopreni unuajn tagojn de NASK: mi alvenis nur la lastan tagon, sed mi povis ĝui la etoson, ĉar partoprenintoj de NASK partoprenis ankaŭ en la Dulanda Kongreso.

Mi devis kombini mian vojaĝon al Kanado kun



vojaĝo al UK, kio estis iom defia. La plej malmultkosta maniero estis unue vojaĝi al Eŭropo kaj poste de Eŭropo al Kanado. Flugbiletoj de Afriko al Kanado normale estas ege kostaj. Mi do unue vojaĝis al Parizo, kaj de Parizo al Toronto, la kongresurbo.

Unua surprizo por mi estis, ke mi ne vidis pasportkontrolistojn. Fakte, mi eniris la landon sen stampo en mia pasporto. Mi eĉ pensis, ke mi erare pretersaltis polickontrolon kaj revenis serĉi policistojn. Ĉarmaj policistoj nur ridetis kaj diris al mi: “Bonvenon al Kanado!”, do tio ege surprizis min.

Mia amiko John Huang kun sia filino atendis min ĉe la flughaveno, kaj kune ni vojaĝis ĉe li. Toronto estas tre bela urbo, kun altaj konstruaĵoj kaj kun mozaiko de loĝantoj el diversaj mondopartoj. Mi restis ĉe John dum du tagoj, kaj estis okazo viziti la urbon kaj mi sufiĉe ripozis antaŭ la Dulanda Kongreso.


Ĵaŭdon ni veturis de Mississauga (loĝurbo de mia gastiganto) al la ĉefurbo, Toronto, por la Dulanda Kongreso (tio estis la lasta tago de NASK). Mi ne aliĝis al NASK, sed mi partoprenis en la lasta agado de NASK: la komuna fotiĝo. Mi revidis multajn amikojn kaj konatiĝis kun novaj amikoj, do troviĝis en nova familio.

La Dulanda Kongreso de Esperanto estas organizita de Usonaj kaj Kanadaj esperantistoj, sed ankaŭ aliaj nacioj estis invitataj partopreni. Eĉ se la kongreso okazis en Toronto, la plejparto de partoprenintoj estis el Usono. Estis kvar honoraj gastoj: el Burundo, Brazilo, Indonezio kaj Ukrainio. Tiuj honoraj gastoj aldonis alian etoson al la kongreso, kiu jam estis partopreninda, per prelegoj. Okazis diskutpanelo, kie la honoraj gastoj respondis al demandoj de partoprenantoj.

Irinte al la kongreslando, mi ne havis ideon, kiel aspektus la tuta afero, ĉar tio estis mia unua vojaĝo al Kanado. Jes, mi jam estis en kontakto kun multaj kanadanoj, fizike renkontis ilin en diversaj Esperanto-eventoj, sed neniam estis en tiu ĉi lando. La organizado de la Dulanda Kongreso havas multajn avantaĝojn por la koncernaj landoj, ĉar ĝi helpas al esperantistoj konatiĝi inter ili kaj plifortigi la movadajn/sociajn ligojn inter si. Tio, fakte, estis ne nur landa, sed regiona kongreso, kaj indas gardi ĝian regulan okazigon. Ni pensis ankaŭ organizi similan eventon en orienta parto de Afriko por doni okazon al niaj aktivuloj interkonatiĝi kaj kunagadi.

Mi prezentis orientan afrikan kulturon — bonega okazo konatiĝi kun alikontinenta kulturo. Estas grave lerni de aliaj, kiel aliaj vivas, manĝas, celebras festojn...







Ambassador Rae's greetings to the Toronto congress

Transcript of the Video Message from Ambassador Bob Rae, Permanent Representative of Canada to the United Nations, and President of the United Nations Economic and Social Council (ECOSOC), on the occasion of the joint Congress of the Canadian Esperanto Association and Esperanto-USA, Toronto, Canada, July 12, 2025

It's very good to be with you on this happy occasion. I want to wish both the American Esperanto association and the Canadian Esperanto association much success on this conference. I think the fact that it's an event that coincides with the International Day of Hope is a good thing because it's certainly something we need a lot more of, and it's also wonderful that American and Canadian associations can be working closely together at a time when sometimes differences are overplayed and it's important for us to remember the things that bind us together.

Speaking very personally and not just in my capacity as President of the Economic and Social Council, but speaking in my own capacity, I think

all of us have been interested in the history of the Esperanto movement, its powerful connections with peace and understanding movements dating back many decades. And I

think the spirit that's driven people to think, if we can create more understanding and break down barriers between people and between language groups, a common language can emerge. Whether that's what happens or not I don't think is as important as the effort, as the fact that we need to

work together and we need to find ways of increasing understanding, creating more empathy, more awareness, more knowledge – sharing that, spreading it as far as we can, and making sure that we're taking all the steps we



Universala Esperanto-Asocio

can to break down the barriers that still exist in our society.

We have a great many conflicts in the world: it's a difficult moment in the life of the planet. These are not easy times. But I think the spirit of the founders of the Esperanto movement and the spirit that brings you two groups together in Toronto is important.

And so, let me close by wishing you in what I am sure is going to be almost incomprehensible to you, but to say: "Mi deziras al vi bonŝancon kaj multan sukceson."

Thank you so much. Much success and much happiness to all of you. Thank you.



Urbeŝtra saluto por la Toronto kongreso



MESSAGE FROM THE MAYOR

It is my pleasure to welcome everyone to the Binational Esperanto Convention, hosted by the Canadian Esperanto Association.

This event is a great opportunity for language learners, educators, cultural performers and international guests with an interest in Esperanto to gather, build connections and exchange knowledge.

I am pleased this international conference is taking place in Toronto. I hope everyone enjoys summer in our city and explores its vibrant neighbourhoods, as well as my favourite place to visit in the summer: the Toronto Islands.

On behalf of Toronto City Council, please accept my best wishes for an enjoyable event.

Yours truly,

A handwritten signature in blue ink, which appears to read "Olivia Chow".

Olivia Chow
Mayor of Toronto

City Hall, 100 Queen Street West, 2nd Floor, Toronto, Ontario / M5H 2N2
416-397-CITY (2489) mayor_chow@toronto.ca

Manifesto de Toronto

Verkita en la tago de Espero, la 12-an de Julio 2025 dum la Dulanda Kongreso en Toronto, kaj proponata al ĉiuj Esperantistoj de bona volo tra la mondo.

Ni, Esperantistoj de diversaj landoj kaj fonoj, konstatas, ke

- la organizita Esperanto-movado alfrontas krizon de identeco unu kvaronon tra la dudek-unua jarcento, trovinte ekzistokialon konvinkan kaj pluvivigan nek en la Esperanta kulturo nek en la pledado por lingvaj rajtoj kaj plurlingveco; kaj plu konstatas, ke
- la tiel-nomata monda lingvo-problemo, kiun Esperanto de sia komenco klopodas solvi, ne estas solvita de la grandaj koloniaj lingvoj; efektive, oni pretendas solvadi ĝin en la nuna epoko per la Artefarita Intelektio tiel, ke homoj povos por preskaŭ ajna celo libere komunikiĝi inter si; kaj plu konstatas, ke
- ŝovinismo, militemo, kaj kontraŭhoma retoriko kreskas tra la mondo, almenaŭ parte reage al la malhomigaj efikoj de la pandemio, ronĝata demokratio, klimatsanĝiĝo, kaj kreskanta malegaleco ene de landlimoj kaj inter landoj.

En ĉi tiun samtempe esperigan kaj senesperan epokon, kaj al nia Movado kaj al la cetera mondo

hejme, komunume, propralande, kaj internacie, ni deklaras, ke

- la organizita Esperanto-movado kiel eble plej urĝe devas montri al la tuta mondo ne nur ke ĝi estas movado de homoj pasiaj pri edukado, lingvoj, demokratio, kaj homaj rajtoj, sed aldone ke ĝi proponadas al la mondo unikan renkontiĝejon interhoman, kiu povas rehomigi la homaron kaj esplori la demandon “kion signifas homi” el ĉiaj eblaj perspektivoj; kaj plu deklaras, ke
- por kreskigi Esperanton, necesas ne honti pri ĝia unikeco, nek deziri ke ĝiaj koridoroj estu similaj al tiuj de neprofitcela organizaĵo, registaro, aŭ internacia instanco; por ĉi tion atingi, la Esperanto-movado ne devas resti margena frakcio, sed devas resti principe interhoma kaj desubisma por ne subfosi sian eblon senpere konatigi la homojn unu al la aliaj profunde; kaj plu deklaras, ke
- la problemoj de malhomigo kreskos kun la disvastiĝo de Artefarita Intelektio, forigante

komunikajn barojn dum ĝi forprenos la laboron kaj la sciaron de granda parto de la homaro per siaj superaj scio kaj analizemo; kaj plu deklaras, ke

- ni trovas en nia historio la kontraŭdozon kaj al movada stagnado kaj al la ĝenerale kreskanta malhomigo, nome la internan ideon de D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof: “forigi la murojn inter la gentoj kaj alkiutimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton;” lia insistado, ke Esperanto estas kaj devas resti pli ol nur meĥanika solvo, pulsas eĉ pli forte en la nuna mondo ol iam ajn antaŭe pro la ekzisto de funkcianta, meĥanika solvo al la monda lingvo-problemo; kaj plu deklaras, ke

- interne kaj ekstere, oni komprenu la

neŭtralismon de la Esperanto-movado ne kiel artifikon por ŝajne ŝvebi super politikaj konfliktoj, sed kiel manieron konservi la interhoman sencon de nia lingvo esprimatan en la interna ideo; tial, la partoprenado de Esperantistoj en movadoj ŝovinismaj, militemaj, kaj kontraŭhomaj subfosas niajn plej esencajn valorojn kaj malhelpas nian movadon; kaj plu deklaras, ke

- Esperanto ne nur kunligas homojn, ĝi plu homigas ilin per neatenditaj malkovroj pri nia komuna homeco; ĝiaj parolantoj kaj organizaĵoj en la nuna epoko havas la ŝancon manifesti tion klare per siaj kongresoj, komunikaĵoj, kaj eventoj, forskuante la polvon de la pasinteco cele al nova futuro kaj por Esperanto kaj por la homaro.

MeKaRo-2026 en Granbeo!

MeKaRo—la Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto — okazos inter la 16-a kaj la 18-a de majo 2026 en Granbeo. Granbeo jam gastigis MeKaRo-n en 2016, do, *jam temp’ esta* por plia sukcesa MeKaRo!

La MeKaRon 2026 organizas longtempaj aktivuloj de Kanada kaj Kebekia Esperanto-Movado: Normando Fleury kaj Zdravka Metz, kun bonega ekskursi programo kaj la nepre vizito al la ikona granbea bestĝardeno. Planu veni jam nun!



La doloro kiun vi volas

Stela Besenyei-Merger, Hungario

Estas la lasta vespero kaj la organizanto de la solena kongresfina programero elektas diversajn muzikojn por provi dancigi la partoprenantojn. Ni jam vespermanĝis, okazis ankaŭ aŭkcio, oni eĉ anoncas kiom da vendoj estis entute kaj ankaŭ la gajnon de la kongresa bazono. Bizare por mi, sed ni ja estas en Nord-Ameriko, kaj tiu ĉi estas la Dulanda Kongreso de landoj gvidantaj la kapitalisman mondon.

Jam estas vere la fino de la nokto, Spotify iĝas enua, la muziko nur kelkfoje bona, ĉefe ne tiom, sed ni daŭre saltadas, moviĝas kun la amikoj. Dancas Macarena de Los del Rio kvazaŭ estus la IJS en 1997. De Jutubo oni enmetas la kanton Sola, kvazaŭ estus IS en 2002 kaj poste eĉ tiun *Mola*-version de renkontiĝo kiun mi ĉeforganizis la unuan fojon en mia vivo, en 2007. Vera tempovojaĝo okazas de emocioj.

Ĉu tiun momenton oni nomas la alveno de plena cirklo?



[Dum jarkomenca podkast-epizodo kun miaj plej ŝatataj uloj](#) ni babiladis pri niaj planoj, pri la apero de la aliĝilo kaj kiom kostos la partopreno en [NASK](#). Mi konstatis, ke tio estis preskaŭ la sama kosto kiom mi ricevis por [Premio Maertens](#). Tiam venis la unua sento, ke eble mi tamen partoprenus tiun renkontiĝon, kiu temas pri studado dum la somero.

Sed kial mi, denaskulo volus studi Esperanton dum la somero? Tiu povus esti nur pro la supera kurso de Rafa Nogueras, dum kiu li instruos verkadon. Persono kiu estas mia amiko instruos ion, kion mi ŝatas, kaj pri kio mi povis scii, ke estos tute partopreninda. Se jam studado, tiam estu io, kion mi volonte esploras.

Mi ankaŭ (r)estas organizata nerdulo por ĉiam, do, ekde kiam mi havas la ŝancon partopreni longdaŭran, longhistorian, klare strukturitan kaj planitan eventon, mi tuj volas mem vidi la detalojn. Tio estas mia tipo de etaj (grandaj) ĝojoj

en la vivo. Do ne temus mia partopreno nur pri la studa flanko, sed mi volas krome noti la spertojn pri la ideo malantaŭ la renkontiĝo, kion oni celas kaj kiel oni sukcesas tion liveri. Mi havas demandojn: ekzemple kiuj sentas sin hejme? Kies ĉefevento ĝi estas? Ne mi estas la publiko, nur simpla gasto, kiu estus bonvenigita al tiu nova cirklo de homoj.

Por multaj homoj en Nord-Ameriko, ĉefe en Usono, tiu ĉi estas *la evento* en kiu partopreni dum la jaro. Same kiel por mi estis [IJS](#) dum longa tempo. Mi ĝoje konstatus kiuj salutas unu la alian kiel longtempaj amikoj kaj kiuj estus novuloj kiel mi. Kvankam mi estas novulo kun pluraj avantaĝoj, mi ja konas kelkajn homojn tie, kaj ankaŭ parolas la lingvon bone.

Tiu ĉi evento por mi iĝis aparte speciala per la aldona Dulanda Kongreso por kunigi du naciojn, kiuj subite politike iĝis “batalantaj”: ĉerizo sur la kuko. Mi kalkulis tien kaj reen la kotizon, la vojaĝkoston, intertempe babiladis kun la organizantoj pri la realeco de mia partopreno. Mi jam havis validan permesilon por

envojaĝi Kanadon. Fine mi aĉetis flugbiletojn pli-malpli monaton post la podkasta babilado. Iel mi iĝis ankaŭ speciala gasto. La decidoj okazis rapide. Sed se oni dirintus al mi dum la komenco de januaro, ke mi ĉeestos la eventojn en Toronto, mi

tute ne kredintus tion. La ĝoja kaj laca alveno al la ejo!

Alvenante al Kanado oni ja haltigis min trifoje por kontroli mian pasporton kaj demandis diversaĵojn pri kien mi iras kion mi partoprenos. Se oni komparus ĉiujn miajn respondojn oni pensintus, ke mi mensogas. Mi ja vizitis amikojn, sed ankaŭ laboris, restis ĉe konatuloj, sed ankaŭ ĉe universitato. Estis ja kongreso, sed ankaŭ studsemajno, distrumado kaj laboro. Multo eblas ene de du semajnoj.

Mi facile trovis la ĝustan trajnon, jam avenis tagon antaŭ la komenco. Promenis, vespermanĝis kun amiko kaj estis preta komenci la aventuron la sekvan tagon. Matene mi frue vekiĝis kaj promenis de mia tranoktejo al la ejo ene de dekkvin minutoj.




**La kvira kvartalo estis
promeneto for de la kongresejo**

La NASK-ejo estis simpla studenta ejo, tute simila en sento al aliaj de miaj junularaj tempoj. Tre taŭga ĉambro por unu persono, ankaŭ por du, se ili bone konas unu la alian kaj volonte dormas tiom proksime. Troviĝis duopa lito kun banĉambro por ĉiu partoprenanto. La manĝoj dum la semajno bone enkadrigis la programerojn; ili estis abundaj kaj tute bonaj. Al mi estas tre interese vidi kion oni servas en kutima manĝejo kaj kiom da sukeraj trinkaĵoj oni ofertas kun desertoj. La senfina kafo dum la tago permesis al mi ĝui mian neaparte sanan kutimon de daŭra kafeinumado.

Mi ŝatas la komunan manĝadon dum eventoj, ĉar estas ebleco iom sidi kune, daŭrigi la babiladon de la leciono, aŭ trovi novajn homojn. Nur unu aferon mi ne pripensis: nord-amerikanoj estas tiom laŭtaj, vere tiiiom laŭtaj. Kelkfoje mi havis la senton, ke ili krias dum la manĝado. Kiam mi ne plu eltenis mi fuĝis al la angulo aŭ al foraj tabloj. Ni loĝis en tri diversaj etaĝoj, kiuj havis ankaŭ

siajn proprajn komunajn ĉambretojn kun fridujo, kuirejeto. Tre praktike por iom private babiladi, havi stokejon por nefinitaj manĝoj, laboreti kun aliaj ĉe la tablo.



En Casa Loma. Fotis Vinĉjo

La ejoj por la lernado kaj komunaj programeroj estis plejparte teretaĝe kun escepto por unu grupo. Tute taŭgaj lernoĉambroj, nenio speciala. Iom malfacile eblis projekcii pro la lumo kaj oni rakontis al mi ke en antaŭaj NASK-ejoj ĉio estis iom pli moderna, ekranoj pli grandaj ktp. Laŭ mi tute taŭgis la spaco por la evento kaj klare la kostoj de la studado kaj ĉio estis vere favoraj, eĉ se por mi ĝenerale altaj, sed oni devas rigardi la kuntekston de la renkontiĝo. Por usonanoj kaj kanadanoj tio estas tre bona prezo kaj valoro.

Estis ankaŭ komuna renkontiĝejo sube, tute taŭga. Ne la plej bonetosa ejo en kiu mi iam ajn estis, nek ni estis solaj en la konstruaĵo, kio ĉiam iom influas la etoson, sed apude estis la kvira kvartalo kaj do proksime eblis en pli bonetosaj lokoj babiladi. La kvira kvartalo estis promeneto

for de la kongresejo.

La strukturo de NASK tre plaĉis al mi, kun studado matene kaj ekskursoj posttagmeze kun eventualaj aldonaj programeroj vespere, nenio daŭra aŭ deviga. Kvankam mi surpriziĝis, ke precize la unuan vesperon nenio okazis. Nenia interkonatiĝo, oficiala programero “nur” vespermanĝo. Mi ne scias kion mi pensus pri tio kiel komencanto. Povas esti, ke mi simple ĝojus je la alveno, eble estus laca kaj ne bezonus tian programeron. Se oni ne scias, ke io mankas, tiam ne mankas io ajn al la persono.

Tamen, la sekvan tagon je la oficiala bonvenigo, mi sentis, ke tro da tempo oni pasigis bonvenigante homojn, kaj se mi estus la organizanto, mi tuj komencus la studadon la unuan plenan tagon. Do tiun parton pri la prezentado de la instruistoj mi farus la unuan

vesperon kun eble interkonatiĝo aŭ simpla renkontiĝo kun la grupanoj tiam. Eble kun oficialaj komencaj grupaj fotoj tiam kaj unu fine de la semajno por vidi la diferencon, amikecon, kreskiĝintan komforton inter la homoj.



La gratulon meritas la ĉeforganizanto, Brajeno, ne mi pro la partopreno. Fotis John Huang.

Krom tio, ĉio estis brila. Mi ekskursis al kastelo Casa Loma, al la norda insulo de Toronto kaj baniĝis en la lago Ontario, vidis nuntempan ekspozicion, vizitis la grandan nacian muzeon ROM kaj promenis al la loka merkato por vidi kion ili vendas tie. Mi aparte ŝatis la daŭran rememorigon je la komenco de ĉiu ekskurso, ke ni estas

adoltoj! Tion signifas la frazo, ke ni mem estas plenkreskuloj kaj zorgu pri ne perdiĝi kaj esti ĝustatempe ĉe la pramo aŭ la renkontiĝejo. Ni estas la respondeco pri ni mem.

La tri grupoj eniris siajn ĉambrojn kaj ni bone lernis ĉiutage inter matenmanĝo kaj tagmanĝo.

Posttagmeze estis diversaj ekskursoj, kelkaj pagendaj, kelkaj ne, kun du bonaj gvidantoj. Estis agrable malkovri diversajn partojn de Toronto kune. Kaj mi aparte laŭdas, ke oni ofertis opciojn nepagendajn, aŭ por kiuj la prezo estis metrobileto.

La urbo havas tre bonan transportsistemon kaj ni povis metroumi kune ĉien. Same plenplena en kelkaj partoj kiel la centro de Budapeŝto. La kvartalo kie ni loĝis estis tre centra kun ĉiuj siaj avantaĝaj kaj malbonaj flankoj. Mi ankaŭ venas de granda urbo kun senhejmuloj kaj kelkaj iom pli strangaj partoj, sed tiom da drogumado surstrate mi neniam vidis en mia vivo. Interese, por ke mi tute ne sentis min malsekura, post kelkaj tagoj oni rekonas la samajn homojn en la kvartalo. Mi ŝatis, ke la renkontiĝo estis en tiom vigla urbo.

La fakto, ke ni estis tuj apud la GLAT-a distrikto de Toronto estis ĝojo. Mi nur revas pri tio, ke

Budapeŝto ekhavu tian parton. La drinkejoj havis la plej afablajn servistojn. Mi trovis multajn bongustajn senalkoholajn bierojn. Kaj la mildaj kundiboĉantoj kompreneble estis la kerno de la amuziĝo. Do trovi ie iun trankvilan spacon por sidi kun afablaj homoj kiam mi ne devis labori estis la

plej bona vespera programo por mi.

Mi sciis, ke ĉiuj grupoj havos tre bonajn instruistojn, mi ne dubis pri la kvalito de la kursoj dum la semajno. Pri mia instruisto Rafa Nogueras mi centprocente povas konfirmi tion. Mi jam persone partoprenis liajn verkeseiojn kaj estis ĝoje aŭdi denove kaj liajn verkojn, kaj malkovri tiujn de aliaj. Estis majstre

konstruitaj lecionoj, materialo interesa, eĉ se mi havis etan problemon pri kelketaj elektoj. Se eblas elekti novelon ne seksisman, kial ne fari tion? Sed krom tio, ĉiuj taskoj trejnigis alian kapablon. Kaj al seksisma novelo povas veni feminisma respondo,



Kion mi vidis de la fino de la tablo. Podkastemaj karuloj de alia programero!

ĉu ne? Kiel tio okazis dum la verksesio. Multaj kursanoj kuraĝis laŭtlege siajn novelojn kaj pluraj estis klare publikigindaj.

Mi mem estas edukisto, do mi ludis per la penso kion mi instruus dum la evento, se mi povus? Mi preferus superan grupon, ke *ne* mi devu klarigi pri gramatiko, sed pri la enhavo mi multe cerbumis.

Mi povus instrui pri socie engaĝita arto, perspektivo, esplorado en urbo, ĉirkaŭaĵo, kreado komune kaj individue. Ne nepre nur verki, sed ankaŭ desegni, observi, interagi. Estus interese vidi kiel tio funkcius en Esperanta medio kun socie relative konsciaj homoj, kiuj aktivas en la komunumo.

Aŭ ĉu mi instruus kurson pri kiel krei podkastojn? Trovado de ideoj, strukturo, kunlaborantoj, verkado de enkonduka epizodo, provsurbendigo, redaktado, prezentado de pecoj dum la sesioj. Tio povus esti tre interesa. Kiel uzi sian propran voĉon en Esperantujo? Kiujn ideojn montri al la tuta mondo?

La semajno pasis tre rapide, mi multege verkis,


ekhavis novajn ideojn, ludis per la taskoj, redaktis, ĝuis aŭskulti novelojn, kelkfoje mem laŭtlegis. Estis bonege. Mi vidis, ke la aliaj grupanoj ankaŭ kuraĝiĝis je la lingvouzo kaj amikiĝis multe. Mi dubas, ke la kursaro povintus pli bone sukcesi. Estis rekorda partopreno post la pandemio, la bonfarto kaj entuziasmo sentebles. Koran dankon al Brajeno kiu faris elstaran laboron por la evento!

Kia homa gemo li estas! Estis aparta plezuro por mi renkonti talentan, bonlaboran organizanton de Esperantujo.

Kelkaj foriris post NASK, sed eĉ pli da homoj venis por la semajnfina kongreso. Kompreneble la praktikeco resti en la samaj loko kaj ĉambro dum alia evento

komencas esti lukso. Mi ne mendis manĝojn por la semajnfino, ke mi povu iom pli libere provi diversajn lokojn kaj fakte malpli manĝi, ne laŭ la ritmo de la ejo, ĉar fakte mi havas tute aliajn manĝkutimojn en mia ĉiutaga vivo.

La transira periodo inter NASK kaj la DLK enhavis ja vesperan programon, [antaŭpublikan](#)



[surbendigadon de epizodo kun la Usona Persone knaboj](#). Mi ŝategis ke mi rajtis ne nur partopreni, sed ankaŭ gvidi alian epizodon kun ili, treege haste antaŭpreparitan, sed tamen ĉio iris bone kaj estis tre amuze la tuto.

La etoso dum la kongreso iom ŝanĝiĝas, la tuto iĝis pli solena, pli da prelegoj, prezentoj, oficialaj kunsidoj de la usonanoj kaj kanadanoj. Tiu pli malfermita programo kaj freŝeco de la semajno estis iom for. Mi mem devis prelegi plurfoje kaj gvidi programerojn.

La solena malfermo sabate enhavis prelegon de Humphrey Tonkin, kaj mi ŝatas lin, kaj liajn rakontojn, sed mi ne povas ne komenti la fakton, ke fine de sia prelego li insistis plurfoje, ke la ĉeestantoj hontu, ĉar ili ne faras sufiĉe por la movado. *Ne nur ĝuu la ĉeeston, sed ankaŭ laboru!* – diris li.

Ĉirkaŭrigardante mi vidis vizaĝon post vizaĝo de homoj kiuj daŭre kontribuas kaj faras laŭ siaj

povoj multon. Kelkajn mi ne konas, sed ili ankaŭ ĉeestas. Mi povas tiun parolon nur kompreni kiel “en mia tempo ĉio estis pli bona” sinteno, do simpla maljuniĝo.

Mi firme pensas, ke oni kontribuos pli al la movado, se oni bonfartas en ĝi, sentas amikan etoson kaj ĝuas la aferon. Poste oni plej verŝajne volos engaĝiĝi, sciante, ke preskaŭ ĉiu volontule faras aferojn, do la tuto dependas de *ni*. Kiel komencanto esti hontigita, aŭdi ke oni ne faras sufiĉe kiam oni ĵus alvenis ne spronos emon je laboro, pri tio mi certas. Aŭdi de jam sperta movadano, ke oni hontu, ĉar oni ne faras sufiĉe estas

malkuraĝige, malsubteneme, malaprezeme ke venas denove *iu*, kiu admonas, ke oni laboru eĉ pli kiam oni jam kontribuas. Ne tiom bona komenca parolo, sed estis ankaŭ saluto de oficialulo kiu fakte estis kuraĝiga en la nuntempa politika situacio inter Usono kaj Kanado. Ni aŭdis kelkajn belajn vortojn ankaŭ de la prezidanto de




Esperanto-USA.

Mi tre ŝatis fari miajn kontribuojn kaj taskojn dum la kongreso, paroli pri mia esploro, [gvidi babiladon pri Esperanto-kulturo kun homoj kiuj abunde kontribuas](#), helpi diskonigi iliajn diversajn projektojn, instigi homojn partopreni, legi, interesiĝi pri kulturaĵoj.

Se ne estis evidente ĝis nun, podkastojn mi ja ŝategas, same kiel gvidi ilin kaj paroli pri ili kaj esti kun homoj kiuj ankaŭ faras ilin kaj same entuziasmas pri tiu formo de kreemo, estas pura ĝojo por mi. Esti parto de du programeroj [rilate al podkasto](#) estas mia gaja spaco. Same iom desegni homojn dum fulmprelego. Iom rompi la troan solenemon rilate al arto.

Mi ankaŭ prezentis pri miaj esploroj (kaj podkasto) pri Esperanto en la familio, kaj povis aŭskulti spertojn de aliaj. Ni ploris en ambaŭ prelegoj pro kortuŝaj momentoj pri la specialaj momentoj kiuj ligiĝas al denaskeco, internaciaj vojaĝoj kaj renkontiĝoj.



Rigardu kiom ĉarma estas nia bebo!

Mi diris en mia prelego “tiu estas la momento kiun mi ne povas rakonti sen havi larmojn.” Dum mi parolis pri la fakto, ke esti inter etaj denaskuloj donas al mi la plej liberigan sperton. Kiam mi

estas kun infanoj de miaj junaĝaj amikoj ili diras al siaj infanoj: Stela estas kiel vi, nur plenkreska jam.

“Mi ne sciis, ke la afero tiom gravas por vi” – venis komento pri mia prelego poste. Ĝi estas mia tuta vivo, kompreneble ĝi gravas por mi, estas kerna sperto de mia infanaĝo.

Krom la prelegoj pinta parto estis povi prezenti [la novelaron Centvorte de Rafa](#). Mi scias kiom da laboro kaj talento estas en tiu libro, do povi babiladi antaŭ viva publiko kun la libro en la mano kun mia amiko estis festa momento. Mi tre ĝojis povi ĉeesti por tiu ĉi sperto persone kaj inviti

homojn malkovri la novelaron.

Ĉiuj libroj de Rafa malaperis de la libroservo rapidege. La bazaro havis bonajn varojn, aĉeti estis facile kaj tiom profesie organizite, ke la organizantoj meritas aldonan aplaŭdon pro tio.

La artan vesperon mi ne tiom ŝatis, ĉar unue: ĝi tute ne estas mia stilo. La diversaj internaciaj vesperoj de la junularaj eventoj ĉiam estis la plej malinteresaj partoj por mi, se temis pri ne bone elektitaj programeroj. Estas malfacile bone strukturi tian vesperon. Due, la ejo vere ne taŭgis por tia prezentaĵo kaj tio ofte malhelpegas artajn programojn, kiel tio okazis ankaŭ en Aruŝo dum la UK pasintjare. Ekzemple, kiam ne eblas malheligi la publikon kaj direkti la atenton nur al scenejo. Eĉ pli malfacile, se tute *ne* estas scenejo sed nur simpla salono, eĉ se la amplifado estas relative bona.

Ĉar fari surbendigon de podkasto estas precize la ĝusta programero por tia ejo. Aŭ havi prezentojn, parolojn. Oficialajn bonvenigojn, ludigi ion surekrane. Mi aŭskultis kelkajn kontribuojn, belajn kantojn, sed la vespero ne estis por mi, kvankam la improvizado de la *bojoj* estis ridige amuza.



La trian vesperon ni promenis for al alia parto de la urbo por havi solenan vespermanĝon kun aŭkcio en pola kulturcentro, la evento per kio tiu ĉi artikolo komenciĝas. Ni promenis tien grupe, alvenante manĝis polajn manĝaĵojn kaj trinkis polan bieron. Mi estas orient-eŭropano, mi konas tiujn gustojn, mi ŝatas ĉion tion.

Ni kartludas ĉe la tablo – kion ni faris la tutan semajnon kiam estis paŭzo. Sinsekve sukcesis pri la ordo. Simpla kaj stulta, rapida kaj kunlabora ludo. Tio ĉiam vigligis la homojn, se komencis esti tediĝo. Eventuale la tabloj estis for, komenciĝis ia dancado, iom da drinkado, la sento, ke tiuj 11 tagoj iom tro haste pasis, tial ke ĉiu tago estis plenplena de la mateno ĝis la vespero per lernado, novaj tekstoj, spertoj,

babiladoj, ridoj, ludoj, amikeco kaj bonhumoro.

La lastan vesperon mi jam sciis, ke mi ne volas, ke la nokto finiĝu. Mi volis resti babilanta kun la homoj. Oni scias, ke tiuj ĉi tagoj estis tiom

specialaj, ke ili kaŭzos seriozan doloron poste. Tiuj homoj, la etoso, la semajno restos en la koro kaj iĝos unu el la plej ŝatataj memoroj. Forflugante de Toronto mi ploris pro ĝojo.

Mi pasigis mian infanaĝon kaj junaĝon tiel: sopirante la sekvan renkontiĝon, la revidon. De longa tempo mi ne sentis tion tiel profunde kiel post DLK kaj NASK. Mi ekkonis brilajn homojn, profundigis amikecojn kun malnovaj karuloj.

Kredu min, tiu estas la doloro kiun vi volas. Ĉar en nia komunumo ni tre bone scias, ke tiuj momentoj estas specialaj. Tiuj estas la spertoj kiujn Esperanto ebligas. Tio estas kial mi engaĝiĝas, tial mi volas renkonti homojn. Mi volas tiujn ridojn, amikecojn, seriozajn kaj freneze stultajn babiladojn. Kaj mi ne volas kaj ne povos eviti la post-renkontiĝajn simptomojn. Ni estas bonŝancaj, ke ni havas ilin.

Kompare al mia infanaĝo nun pro la reto ni povas resti en kontakto pli facile. Sendi fotojn, memeojn, krei GIF-ojn, interŝanĝi artikolojn, ĉiutagaĵojn ĝis la sekva brakumo.

Unue aperis en la retejo:

stelachiamnurkritikas.wordpress.com/2025/08/20/la-doloro-kiun-vi-volas

Usona Bona Film-Festivalo

Spektu la [novan rikolton de la sepa eldono de Usona Bona Film-Festivalo](#), kun eĉ partopreno de nia propra John Huang kun la filmo “Ĉerizoj”. Ne maltrafu la ĉarman filmeton de Alekso Miller de la ŝekspira teatraĵo “Kiel plaĉas al vi”, kiu mem premieris en 1910 kaj... pripensu partopreni en la oka eldono (aŭtuno 2026)



Kantoj de la Dulanda Kongreso

Jordan Zero

Post la arta vespero de la Dulanda Kongreso, multe da homoj demandas min pri la tradukoj de la kantoj kiujn mi kantis, dirante ke ili neniam aŭdis ilin antaŭe. Eblas pardoni niajn amikojn Usonanajn, sed la Kanadanoj kiuj ĉeestis la pasintajn Kanadajn Virtualajn Kongresetojn (KVAK-ojn) jam estus aŭdintaj ĉi tiujn kantojn. Jen via averto ke vi ne maltrafu la venontan KVAK!

1. Adiaŭaĉo: *Good Riddance (Time of Your Life)* de Green Day


Dum ŝanĝanta moment', la pado duiĝas
Tempo kondukas vin al kie ĝi volas
Do faru ĉion kion vi ja povas
Ne estas dubo ke destino ja venas

La neantaŭvidebla viv' klariĝas je la fin'
Esperas mi ke viv' ĝojigis vin

Tenu la fotografaĵojn en menso via
Sur la bret' restas ili por ĉiam
Tatuaj memoroj kaj haŭto juĝita
Valoris tiam kaj valoros por ĉiam

La neantaŭvidebla viv' klariĝas je la fin'
Esperas mi ke viv' ĝojigis vin.

Por la 6-a Kanada Virtuala Kongreseto
(2023-11-18)



2. La spirito de radio: *The Spirit of Radio* de Rush

La kanto *The Spirit of Radio* estas de la kanada rokgrupo Rush. La titolo venas de la devizo de loka radio-elsendejo en Toronto “CFNY 102.1” (eble estas Torontanoj, kiuj rekonas tiun nomon, ĉar ĝi ankoraŭ elsendas uzante la nomon “CFNY The Edge”).

Malgraŭ la ĝoja etoso de la kanto, ĝi fakte estas lamento pri la ŝanĝo, de libere programita muziko elektita de la radio-gastigantoj, al komercaj antaŭelektitaj muziklistoj elektitaj de komercistoj. La elsendejo en Toronto, estis unu el la elsendejoj, kiuj ankoraŭ rajtigis siajn gastigantojn elekti sian propran muzikon libere, kiam Rush verkis la kanton. Sed la kanto ne estas omaĝo al tiu specifa elsendejo, ĝi ja fine forigis la rajton libere elekti muzikon de siaj gastigantoj, sed la kanto temas pri la “interna ideo” de libere programita radio; tio estas, ke ĝi estas ilo por disvastigi novan, interesan kaj valoran muzikon, eĉ se la muziko ne estas aparte komerca.



Sed mi opinias, ke la kanto havas novan signifon en la nuna epoko. Dum epoko, kiam oni povas simple tajpi peton en maŝinon kaj ricevi informon, poemon, arton aŭ kanton, oni sendube pripensas “Ĉu homa arto mortos? Ĉu ĝi jam mortis? Ĉu fari arton, aŭ lingvan, aŭ muzikan, aŭ vidan ankoraŭ valoras, indas, aŭ eĉ gravas?”

Laŭ mi, tio nun estas, pri kio temas la kanto, ne plu specife radio, sed pri teĥnologio kaj arto pli ĝenerale. Post ĉiu teĥnologia antaŭenigo la art-mondo ŝanĝiĝas. Sed muziko neniam mortis nek mortos. La maniero, per kiu homoj ĝuas kaj kreas ĝin simple ŝanĝiĝis.

Kiel la granda rok-poeto kaj tamburisto de Rush, Neil Peart, diras: “Moderna muziko farita per maŝinoj ankoraŭ estus homema... la kondiĉo estas honesteco.”

Tio vere estas pri kio temas la “Spirito de Radio”: la honesteco de homoj, la amo de arto kaj la nekomerca klopodo krei. Tial mi diras: vivu la spirito de radio.

La tag' nova kun amika voĉ'
de kunulo ne trudema.
Sonas kanto nekaptebla
kaj magia muziko vin feliĉigas

Veturante sur malplena voj'
kun magio je viaj fingroj
Ĉiam restas la spirito
ne ĝenante vin en via soleco



Nevideblaj ondoj krakas vive,
brilaj antenoj viviĝas pro energi'.
Reag' emocia sur ond' eterna
portas donacon netakseblan
preskaŭ sen prez'.

Moderna muziko farita per maŝinoj
ankoraŭ estus homema
sen sensenta rango.
La kondiĉo estas la honestec',
jes la honestec'.
Je la liberec' de muziko ni kredas,
sed belaj premioj, senfinaj kompromisoj
rompas la iluzion pri virteco, jes.

La vortoj de profetoj estis skribitaj sur la eldonej',
koncertej'.
Eĥas pro la son' komerca,
komerca,
komerca.

Por la 7-a Kanada Virtuala Kongreseto (2024-04-17)

“1910”: la filmo pri la filmo

La partoprenantoj de la Dulanda Kongreso estis la unuaj esperantistoj, kiuj spektis la enhavon de la *bluray*-disko “1910” (detaloj anoncotaj en la retejo de Esperanto-USA), kun diversaj kromaj materialoj, intervjuoj kaj malantaŭkulisaj rakontoj. Alekso Miller kaj Ĵenja Amis prezentis la projekton kaj respondis la demandojn.



La arta vespero sukcesegis!

Dum la toronta arta vespero mankis vere nenio! Kvin jarcentoj de muziko (klasika, nuntempa, de pluraj kontinentoj!), teatro, dancoj, deklamado kaj eĉ improva komedio!



Projekto Ellenberger prezentita dum la Esperantologia Konferenco en Brno

Dum la Universala Kongreso 2025 en Brno (Ĉeĥio), kadre de la 47-a Esperantologia Konferenco, okazis prelego pri la Projekto Ellenberger. La

projekton kaj ĝian evoluon prezentis la filino de Henri, Irène Ellenberger, Ĵenja Amis, Gabriel Labrie (ĉiuj tri el Montrealo) kaj Pascal Dubourg Glatigny el Francio (Parizo). Jen parto de la konferenca kajero:

“La kontribuo prezentos vastan kaj neeldonitan korpuson verkitan en Esperanto: la taglibron de la psikiatro kaj krimologia profesoro Henri Ellenberger (1905-1993). Ellenberger redaktis siajn pensojn kaj travivaĵojn tagon post tago dum la plej granda parto de sia vivo, precipe de la 1940-aj jaroj ĝis la 1970-aj jaroj. Tiuj dokumentoj kies ekzisto ĝis

antaŭ nelonge ne estis konata estas transdonitaj al la Aŭstria Nacia Biblioteko kie ili estas rete alireblaj. La kolekto entenas 42 taglibrojn (po 250

– 300 paĝoj) kiuj kovras la jarojn 1940 ĝis 1989 kaj estas verkitaj ĉefe en Esperanto.

Ellenberger estas konata en intelekta historio; li verkis multajn akademiajn publikaĵojn pri sanhistorio, interalie la furorlibron, The Discovery of the unconscious (Ellenberger, 1994 [1970]), unu el la fundamentaj eseoj por la kultura historio de

psikanalizo, psikiatrio, psikoterapiaj praktikoj kaj psikologiaj doktrinoj. La verko estis tradukita en multajn lingvojn. Ĝis lastatempe ne estis publike sciite ke Ellenberger scipovis Esperanton.”

Legu pli en Libera Folio [Henri Ellenberger kronikis sian vivon Esperante – Libera Folio](#).



Plia sukcesa MeKaRo

Normand Fleury

Ni ne estis multnombraj, sed tiuj, kiuj partoprenis MeKaRon 2025 en Otavo, vere ĝuis bone planitan semajnfino.

Sabate post akcepto en bela restoracio, kiu troviĝas en historia ekspreĝejo, ni kune vizitis la Muzeon pri agrikulturo kaj nutrado. Estis bona ebleco ekzerci nin pri la nomoj de bienbestoj. La tago finiĝis per agrabla vespero en la apartamento de Merle kaj Guy. Post amika kunbabilado, longa tablo pretis por vespermanĝo kaj sekvis prelegeto de Suzanne Caron-Richer pri fosilioj kaj geologio de otavia regiono.

Dimanĉe, dum la vizito de sinagogo Templo Israel, ni malkovris vere interesajn faktojn pri la juda

religio. Merle klarigis pri postmorta omaĝo, pri sabata diservo kaj multe pli. Speciale invitita por ni virino legis el Torao, kaj ni povis aŭdi, kiel sonas la hebrea lingvo. La tagmanĝo okazis en ĉelaga

restoracio meze de parko, kie eblis vidi milojn da diverskoloraj tulipoj. Tiuj tulipoj estas donaco de Nederlando al Kanado, por danki, ke Otavo gastigis ilian reĝan familion dum la Dua Mondmilito kaj helpis al liberigo de tiu lando.

Mi volas danki al Merle kaj Guy, kiuj respondicis pri nia bonfarto en Otavo kaj bone planis la renkontiĝon.

Jam notu ke MeKaRo 2026 okazos en Granbeo (Granby) en Kebekio de la 16-a ĝis 18-a de majo.







Geoffrey Greatrex elektita kiel membro de la Akademio de Eŭropo!

Universala Esperanto-Asocio (UEA) ĝojas anonci, ke la eminenta profesoro Geoffrey Greatrex, konata esperantisto kaj universitata esploristo, estas elektita membro de la Akademio de Eŭropo (Academia Europaea), unu el la plej prestiĝaj sciencaj institucioj de la kontinento (<https://www.ae-info.org>).

Fondita en 1988, la Akademio de Eŭropo kunigas elstarajn fakulojn el diversaj fakoj – inter ili Nobel-premiitojn kaj membrojn de naciaj akademioj, cetere ne nur de Eŭropo – kun la celo stimuli internacian sciencon kunlaboron kaj interŝanĝon de scio en la plej alta nivelo. La nomumo de Greatrex, profesoro pri klasikaj kaj religiaj studoj ĉe la Universitato de Otavo (Kanado), estas gratulinda agnosko de lia scienca kontribuo kaj grava aspekto de la ligo inter esperantistoj kaj la internacia mondo de scienco.

“Ni ĝojas, ke esperantisto estas agnoskita por eniri en tiel gravan eŭropan forumon. Tiaj momentoj memorigas, ke la Esperanto-movado dividas kun internaciaj sciencaj instancoj la saman spiriton de interkompreniĝo, kunrespondeco kaj deziro progresigi la mondon” – deklaris Fernando Maia Jr.,

prezidanto de UEA, interparole kun Greatrex.

UEA konsideras, ke la ĉeesto de esperantisto en la Akademio de Eŭropo malfermas pordon al dialogo pri lingva justeco, scienca alireblo kaj internacia kunlaboro sen lingvaj baroj. La Estraro de UEA restos en kontakto kun Greatrex por kompreni eblojn, establi pli proksimajn rilatojn kun la

Akademio, precipe okaze de la venonta 111-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Graz (Aŭstrio), kie unu el la sidejoj de la Akademio situas. UEA bonvenigas ĉiujn aliĝi al la 111-a UK: uk.esperanto.net

“Mi estas honorigita de tiu elekto kaj pretas labori por la celoj de la Akademio kaj en ĝi pli bone konigi Esperanton kaj ĝiajn valorojn. La UK en Graz povos esti perfekta ŝanco por ebligi tiun dialogon” – komentis Greatrex kun la Estraro de UEA.

Cetere de Greatrex aperos en Esperanto (tradukita el malnovstila helena lingvo) la libro “La persaj militoj”, verkita de Prokopio de Cezareo (Palestino) en ĉ. 550 kaj eldonota de Mondial por la Serio Oriento-Okcidento de UEA. Pliaj informoj aperos.

El Gazetara Komuniko de UEA



Luis Obando, estrarano de KEA, estas unu el plej bona regantoj de Esperanto en 2025!

Okaze de la KER-ekzamenoj de la 110a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Brno, UEA lanĉis la Konkurson “La plej bona reganto de Esperanto”, al kiu invitis la C2-nivelajn kandidatojn, kiuj sukcese trapasos kaj la skriban kaj la parolan partojn de la ekzameno. Nia propra Luis Obando gajnis la duan premion — gratulegojn al li!

El inter la 15 ekzameniĝintoj ok personoj el ses landoj anoncis antaŭ la ekzameno sian intencon partopreni la konkurson. La ekzameno okazis la 1an de aŭgusto, parte en Brno, en ĉeesta formo kaj paralele ankaŭ rete. Papere ekzameniĝis entute 12 personoj kaj rete 3.

Laŭ la reguloj ĉiu reprezentata lando rajtas nur je unu “plej bona reganto de Esperanto” por la kuranta jaro – do la tri unuaj premioj estas por la tri kandidatoj kun plej multaj poentoj el tri malsamaj landoj. Baze de tio UEA kaj la KER-ekzamena Centro de UEA anoncas la finan rezulton.



La konkurson gajnis S. Alexandra Sato el Usono (119,6 poentoj), kiu senpage rajtos partopreni la 111an Universala Kongreson de Esperanto en 2026 aŭ povos uzi aĉetkuponon ĉe la Libroservo de UEA je la valoro de 100 eŭroj.

La duan premion gajnis Luis Miguel Obando Tobar (110,7 poentoj), kolombiano nun loĝanta en kaj konkursanta por Kanado, Lia premio estas 50%-a rabato en la aliĝo al UK 2026 aŭ aĉetkuponon ĉe la Libroservo de UEA je la valoro de 75 eŭroj.

La tria premio, aljuĝita al Ferriol Macip i Bonet (103,6 poentoj) el Hispanio, estas aĉetkuponon ĉe la Libroservo de UEA je la valoro de 50 eŭroj.

Laŭdan gratulon ricevas ankaŭ Brandon Sowers, la tria plej sukcesa kandidato, tamen la dua el Usono.

El Gazetara Komuniko de UEA

John Huang: estrarano de KEA, estas inter la UEA-premiitoj por elstara agado!

En la Solena Fermo de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Brno (Burno) estis anoncita la disdono de 6 diplomoj pri Elstara Agado kaj 1 pri Elstara Arta Agado por la jaro 2025.

Nisinaga Atusi "Acero" (Japanio) pro elstara agado kiel kunordiganto de la Komisiono de UEA pri Azia- Oceania Movado (KAOEM), interalie pro efika subteno al la okazigo de 10-a Azia-Oceania Kongreso (AOK), kaj pro la longtempa agado por Esperanto en Japanio.

Henriel Fidilalao (Madagaskaro) pro la aktiva laboro pri disvastigo de Esperanto en Madagaskaro, interalie per prizorgado de la reta "Aminda Radio Esperanto", kiu elsendiĝis jam 153-foje, kaj la monata revuo "Panoramo de la Granda Insulo".

John (Xiaolong) Huang (Kanado) pro la elstara aktivado kadre de Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio (IKEF), kiel prezidanto de IKEF Nordameriko, ĉefredaktoro de la revuo "La Merkato", organizanto de ĉiu-dimanĉa reta kunveno. Krome li estas oficiala fotisto de UK ekde 2022.



Françoise "Fransoazo" Noireau (Francio) pro la elstara agado pri instruado de Esperanto en Afriko per la reto (Vacapo) kaj kunordigo de 16 instruistoj, plimulte afrikaj, kadre de kunlaboro kun la Universitato Espero en Barako, D R. Kongo

Libuše Dvořáková (Ĉeĥio) pro longjara prizorgado de la Esperanto-muzeo en Svitavy.

Věra Barandovská-Frank (Germanio/Ĉeĥio), ĉi-jara rektoro de Internacia Kongresa Universitato (IKU), pro la multjara lingvistika agado kunlabore kun la edzo Helmar Frank pri la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), longtempa instruado en Poznano kaj verkado de ĉ. 130

sciencaj publikaĵoj.

Bobelarto (Hungario/Kanado) pro la elstara kontribuo al la literatura agado en Esperanto, interalie per organizado de Internacia Novel-Konkurso (INK), literatura duonmaratono, verksesioj kaj legosalonoj.

El Gazetara Komuniko de UEA

Himalia:

kanada sciencfikcia filmo en Esperanto


Nicolas Viau

En oktobro 2024, kadre de “Festival du nouveau cinéma”, premieris en Montrealo la mallonga sciencfikcia filmo en Esperanto, “Himalia”. Tiu unika kaj originala kinarta verko, kies lingvaĵoj estis flegitaj de kebekiaj esperantistoj, estis reĝisorita de Clara Milo kaj Juliette Lossky – neesperantistoj. Ĝi konkuris kun aliaj mallongaj kanadaj filmoj kadre de tiu kinarta festivalo.

Temas pri unu el la malmultaj profesiaj filmoj en Esperanto. Kiel tio okazis? Mi koncize rakontu...

Unuaj spuroj

Fine de la printempo en 2023, mi hazarde eksciis,



ke estis elsendita en Montrealo alvoko por aktoroj, en kiu oni devas reciti liniojn en Esperanto... iom(ege) nekutima afero!

La kanada kinartisto (kaj esperantisto!) Matthew Rankin kaj Yevgeniya (Ĵenja) Amis petis movadan helpon (mi tiam prezidis la Esperanto-Societon Kebekian). Evidentiĝis, ke ja ekzistas projekto pri filmo en Esperanto, kaj ni baldaŭ ricevis scenaron, kun skiza traduko de la dialogaro. Aventureto komenciĝis!

Kaj la kinartistoj kaj la produktistoj deziris, ke la filmo estu en bonkvalita Esperanto. Do ekestiĝis traduka grupeto konsistanta el la kebekiaj esperantistoj Sylvain (Silvano) Auclair, Ĵenja Amis kaj mi mem. Mi



ankaŭ helpis al la aktoroj akiri ĝustan elparolon de nia lingvo. Mi mem eĉ havas voĉan rolon en la filmo, samkiel alia esperantisto el Kebekio, Tamara Anna Koziej. Temas do pri bela tema laboro!

La filmado okazis en bela kampara etoso en la kanada (kaj ebena) provinco Manitobo fine de la somero 2023 – en tiu fazo mi ne partoprenis, sed evidente la vetero belis, kaj ĉio okazis senprobleme.

Pri kio temas?

Ni ne malkaŝu tro da detaloj, ĉar multaj esperantistoj certe volos spekti la filmon, sed temas pri mallonga (ĉ. 20-minuta) sciencfikcia



filmo, kies dialogaro estas tute en Esperanto.

Temas pri la vivo de familio, ritmita de la sunlumo, en bela bieno, en sufiĉe fora estonteco, sur Himalia. Estas kvar roluloj. Mi ne diru pli!

Ĉu eblas spekti ĝin?

Oni jam okazigis tri fojojn specialajn projekciojn (kun permeso de la distribua firmao de la filmo) antaŭ Esperanta publiko kadre de kanadaj aranĝoj. Espereble ankaŭ estos pliaj okazoj montri la filmon dum postaj Esperantaj kunvenoj.

Ĝi ankaŭ spekteblas per la servoj de grava eŭropa dissenda servo: ARTE (arte.tv) ekde la 8-a de januaro 2026.

Clara Milo, kunkreintino de Himalia (kun Juliette Lossky) respondas demandojn de Nicolas Viau

Kiu estis la kerna ideo de la projekto? Kial vi elektis Esperanton?

CM: La kerna ideo de la filmo fontis el la deziro krei filmon, en kiu la lumo estas la ĉefa “rolulo”. Provante realigi tiun deziron, Juliette kaj mi alvenis al la elpenso de mondo, kiu ne estas la Tero, sed satelito de Jupitero, sur kiu la lumo “malsame” moviĝas.

Ni ekkonsciis, ke la filmo fakte temos pri la estonteco. Origine, la scenaro estis verkita en la angla. Sed ni poste ekhavis la ideon, ke estontece la ĉefa lingvo ne estus ĉu la angla, ĉu la franca aŭ alia tia lingvo. Sed ĝi povus esti “elpensita” lingvo. Mi jam estis aŭdinta pri Esperanto, kaj ni do tiel decidis.

Tiucele, ĉu eblus uzi jam ekzistantan “dialekton” por provi bildigi tiun estontecon? Esperanto, kiu estas relative freŝdate aperinta lingvo, iĝis nemaltrafebla elekto, fakte.



La koncepto malantaŭ la lingvo tiom belas, ke ni volis montri universon, kie tiu lingvo konkeris la mondon!

[...] Post la elekto de Esperanto, ĉu la lingvo ŝajnis al vi aparte malfacila afero, aŭ ĉu nur unu inter pluraj, ĉar diversaj aspektoj de la reĝisorado de filmo povas evidentiĝi malfacilaj!

CM: Mi jam havis sperton reĝisori filmon en fremda lingvo: la islanda, kiu estas lingvo, kiun mi ne parolas. Kiam tiu filmo, kies titolo estas “Aska”, estis projekciita en kinejo, mi fakte ekkonsciis pri tio, ke la rakontado estis reliefigata pro

la fakto, ke oni devas legi subtekstojn. La aŭdata dialogaro fariĝas melodio, kiu lasas la publikon atenti la “literaturaĵojn” de la filmo, io, kion oni kutime apenaŭ atentigas, kiam la frazoj “nature” glitas en nin.

Do Esperanto ne timigis min, ĉe se iuj teamanoj ja

iom timis tiun aspekton. Tamen, dum tiuj rolulelektaj sesioj, kiujn ni gvidis kaj en la franca kaj en Esperanto tiel, ke ni povu kompari, ni rimarkis, [...] ke iuj homoj ŝajnas pli trafaj Esperante ol franclingve!

La lingvo ebligis ilin distanciĝi de la vortoj kaj esprimi sin per emocioj anstataŭe. [...]

Pri Esperanto mem, laŭ mia kompreno, vi jam konsciis pri la ekzisto de Esperanta lingvokomunumo, sed kion precize vi sciis? La filmo nun ankaŭ estas parto de Esperanto-kulturo! Temas pri ero de la publiko, kiu speciale rilatos al la filmo.

CM: Ni ne vere pensis pri tio. La projekto ja celas tiom specifajn publikerojn kaj estas tiom “niĉa”, ke ni ĉiuokaze ne celis la ĝeneralan publikon. Sed ni restis fidelaj al nia koncepto, kion la fina rezulto ja spegulas.

La filmo restas sufiĉe alirebla, sed ja celas komunumojn, ekzemple astronomiŝatantojn – ja

temas pri sciencefikcia filmo, kun relative realeca sinteno. Oni povus taksu ĝin kiel filmon el diversaj subgenroj. Ĝi allogas publikon de pasiuloj, ĉu Esperantistoj, ĉu ŝatantoj de sciencfikcio.

Himalia cetere prezentas pozitivan estontecon. Mi

ne plu eltenas ĉiam spekti apokalipsajn filmojn, en kiuj ĉio detruigis! Krei ion, kio spegulas optimisman estontecon sanigas la animon. Tio al ni vere gravis. Eĉ se ankaŭ en tiu estonteco ĉio ne estas perfekta.



Estas ankaŭ en la filmo fantasmagorio de la Tero, ekzemple per la glorigo de bestoj.

La muziko de la filmo, siaflanke, utiligas multajn instrumentojn, en stilo, en kiu la diversaj influoj estus tre aŭ diluitaj aŭ kunfanditaj, kaj kreis ion, kio, kvankam ĝi pensigas la aŭskultantojn pri diversaj aferoj, ne vere rekoneblas, kaj kion ne eblas facile situigi epoke aŭ loke. Ankaŭ tion ni celis per la uzo de Esperanto. [...]

Esperanto estas nova kulturo, kiu ebligas al ni

vojaĝi en mondo, kie oni ne estas ankrita – [...] Esperanto ne estas ligita al specifa kulturo aŭ eĉ specifa epoko. Parolante dum tiu ĉi intervjuo, mi memoras, kiel ĝusta estis nia elekto!

Ĉu vi povus iom paroli pri viaj estontaj projektoj, kaj kiel ili povus esti influitaj de la sperto realigi la filmon “Himalia”, filmo originala interalie pro sia elekto de Esperanto kiel lingvo? [...]


CM: Mi provos, en mia venonta filmo, inkluzivigi la korsikan lingvon. Mi havas grandegan respekton por fremdaj lingvoj. Mi kredas, ke kaj muzika kaj lingva diverseco multe influas artaĵojn. Mi ankaŭ havas projekton, kiu estas dokumentfilmo pri arbaraj fajroj, cele al kio mi vojaĝas tra la tuta mondo...

Kadre de miaj projektoj, mi provas neniam igi la anglan “baza lingvo”, aŭ se ĝi aperu, ke ĝi estu [...] nur unu lingvo inter diversaj. Laŭ mi oni taksas la anglan en kinarto pli grava, ol oni devus. Unuflanke, oni ja komprenu, ke ĝi ebligas aliron al pli vasta publiko. Sed mi pli ŝatas plaĉi al malgranda publiko, kiu vere ŝategos la filmon pro ĝia aŭtentikeco. Mi iam aŭdis, ke pli valoras 100 veraj fanoj ol 1000 nuraj “sekvantoj”.

Traduko: Nicolas Viau

Reklamfilmeto: vimeo.com/1017560555

Informoj: travellingdistribution.com/film/himalia-583





Himalia:

un film canadien de science-fiction en espéranto

Nicolas Viau

En octobre 2024, dans le cadre du Festival du nouveau cinéma, a eu lieu la première du court métrage de science-fiction en espéranto «Himalia». Cette œuvre cinématographique originale, dont se sont occupés, en ce qui concerne l'espéranto, des espérantistes québécois, a été réalisée par les cinéastes Clara Milo et Juliette Lossky – qui ne parlent pas elles-mêmes espéranto. Le film a concouru dans le cadre du festival contre d'autres courts métrages canadiens.

Il s'agit de l'un des rares films réalisés professionnellement en espéranto. Comment cela est-il arrivé? Permettez-moi de vous en dire quelques mots.

Premiers signes

À la fin du printemps 2023, j'ai su par hasard qu'une annonce pour des auditions de rôles en espéranto avait été lancée à Montréal... ce qui n'est vraiment pas courant!

Le réalisateur canadien (et espérantiste!) Matthew Rankin et Yevgeniya (Ĵenja) Amis ont demandé l'appui de la communauté espérantophone dans le cadre du projet (je présidais à l'époque la Société québécoise d'espéranto). Nous avons constaté qu'il existait bel et bien un projet de film en espéranto, et nous avons peu après reçu un scénario, avec une traduction préliminaire des dialogues. Une petite aventure venait de commencer!

Tant les cinéastes que les productrices du film souhaitaient que la qualité de l'espéranto présent dans le film soit élevée. Une petite équipe de traduction a donc été mise sur pied, constituée des espérantistes québécois Sylvain Auclair, Ĵenja Amis et moi-même! J'ai aussi aidé les acteurs à acquérir une bonne prononciation de l'espéranto. On entend même ma voix dans le film, tout comme celle d'une autre espérantophone du Québec, Tamara Anna Koziej. Il s'agit donc d'un beau travail d'équipe!

Le tournage a eu lieu dans la belle (et très peu vallonnée) campagne de la province canadienne du Manitoba, à la fin de l'été 2023 – étape à laquelle je n'ai pas participé personnellement. Le beau temps a été au rendez-vous et tout s'est bien passé.

De quoi s'agit-il?

Ne donnons pas ici trop de détails, car nombre d'espérantistes souhaiteront sûrement voir le film, mais il s'agit d'un court métrage (une vingtaine de minutes) de science-fiction, dont les dialogues sont entièrement en espéranto.

Il raconte la vie d'une famille, rythmée par la lumière du soleil, dans une belle ferme sur Himalia, dans un futur assez lointain. Il y a quatre personnages. Je préfère ne pas en dire plus!

Comment le voir?

Le film a déjà été projeté devant un public espérantophone (avec la permission de l'entreprise qui distribue le film) trois fois, lors de divers événements au Canada. On peut espérer que d'autres occasions de projeter le film se présenteront lors d'événements d'espéranto futurs. Le film sera aussi bientôt disponible par l'intermédiaire d'un important distributeur européen: ARTE.

Himalia sera diffusé dans le magazine Court-circuit sur ARTE le jeudi 8 janvier 2026 et disponible au public gratuitement sur [arte.tv](https://www.arte.tv).

Le film sera, espérons-le, aussi sélectionné pour concourir dans le cadre de divers festivals.

Clara Milo, une des créatrices du film (avec Juliette Lossky), répond à des questions de Nicolas Viau

Quelle était l'idée de base du projet? Pourquoi avoir choisi l'espéranto?

CM: L'idée du projet est venue du désir de créer un film où la lumière était le « personnage » principal. En essayant de réaliser ce désir initial, Juliette et moi en sommes arrivées à concevoir un monde qui n'était pas celui de la planète Terre, mais une lune de Jupiter où la lumière « bougeait différemment ».

Nous nous sommes rendu compte que nous allions faire un film situé dans le futur. À l'origine, le scénario avait été écrit en anglais. L'idée nous est alors apparue que dans le futur, la langue utilisée ne serait pas l'anglais, le français ou une autre langue semblable. Ça pourrait être une langue « inventée ». J'avais déjà entendu parler de l'espéranto et nous avons alors pris la décision.

Dans cette perspective, pourrait-on utiliser un « dialecte » déjà existant pour essayer de représenter le futur? L'espéranto, lui-même une langue apparue relativement récemment, s'est imposé comme un choix évident, en fait.

Le concept de la langue est tellement beau qu'on voulait ouvrir sur un univers où cette langue avait

conquis le monde!

[...] Une fois fait le choix de l'espéranto, la langue vous apparaissait-elle comme une difficulté particulière, ou juste une parmi plusieurs, puisque divers aspects de la réalisation du film ont pu s'avérer complexes!

CM: J'avais déjà une première expérience de réalisation de film dans une langue étrangère: l'islandais, une langue que je ne parlais pas. Lorsque ce film, « Aska », a été présenté en salle, je me suis rendu compte que toute la narration était mise en valeur du simple fait qu'il faille lire les sous-titres. Le dialogue entendu devenait comme une mélodie, qui laissait l'attention se porter sur la « littérature » du film, normalement tenue pour acquise lorsque les phrases nous glissent dessus naturellement.

Donc l'espéranto ne me faisait pas peur, même si certaines personnes au sein de l'équipe ont pu avoir des appréhensions. Toutefois, lors des auditions, que nous faisions passer en français puis en espéranto pour avoir un point de comparaison, nous nous sommes rendu compte que certaines personnes [...] étaient en fait plus



crédibles en espéranto qu'en français!

La langue leur permettait de se détacher des mots et de s'exprimer avec leurs émotions à la place. [...]

En ce qui concerne l'espéranto lui-même, on comprend que tu avais conscience de l'existence de la communauté espérantophone, mais qu'en savais-tu au juste? Ce film fait maintenant partie de la culture espérantophone lui aussi! C'est un public qui aura une relation particulière avec le film.

CM: Nous n'y avons pas vraiment pensé. Le projet est dans tous les cas tellement « niche » et inhabituel que nous ne visions de toute manière

pas le grand public. Mais nous sommes restées fidèles à notre vision et le résultat final en témoigne.

Le film reste toutefois relativement accessible, mais s'adresse à des communautés, par exemple les amateurs d'astronomie – le film se veut une œuvre de science-fiction avec un certain réalisme. Il peut se classer dans beaucoup de sous-genres. Ça fait appel à un public de passionnés, qu'il s'agisse d'espérantophones ou de fans de science-fiction.

Himalia présente par ailleurs une vision positive du futur. J'en ai personnellement assez de voir des films apocalyptiques dans lesquels tout est détruit! Ça fait du bien à l'âme de créer quelque chose qui ouvre sur un futur optimiste. C'était quelque chose de très important pour nous, même si tout n'est pas parfait dans ce futur-là non plus.

Il y a aussi dans le film une fantasmagorie de la Terre, avec par exemple une glorification des animaŭ.

La bande musicale du film, quant à elle, est pleine d'instruments, dans un style où les influences se seraient tellement diluées ou auraient fusionné, jusqu'à créer quelque chose qui, tout en évoquant des souvenirs, n'est pas reconnaissable

et ne se place pas facilement dans l'espace ou dans le temps. C'est en quelque sorte aussi ce que nous avons souhaité faire en utilisant l'espéranto. [...]

L'espéranto est une culture nouvelle, elle nous permet de voyager dans un monde où nous n'avons pas de point d'ancrage – [...] l'espéranto n'étant pas lié à une culture ni même une ère en particulier. En en parlant, au cours de cette entrevue, ça me rappelle à quel point on a fait le bon choix!

Pourrais-tu nous parler un peu de tes projets à venir, et comment ces projets pourraient-ils être orientés par l'expérience d'avoir réalisé « Himalia », film original entre autres par le choix de l'espéranto? [...]

CM: J'essaierai, dans mon prochain film, d'inclure du corse. J'ai un immense respect pour les langues étrangères. Je trouve que tout ce qui

touche tant à la diversité musicale que linguistique influence beaucoup une œuvre. J'ai un projet de documentaire sur les feû de forêts pour lequel je me déplace partout dans le monde...

J'essaie de faire en sorte que l'anglais ne soit jamais la langue « de base » dans mes projets ou, si elle est présente, que ce soit [...] une langue parmi plusieurs. Je trouve qu'on accorde trop d'importance à l'anglais dans le cinéma. D'un côté, ça peut se comprendre pour se rendre accessible à un public plus large. Mais je préfère sacrifier la taille du public au fait de plaire à un auditoire qui va vraiment apprécier le film pour son intégrité. Quelqu'un

a déjà dit qu'il valait mieû avoir 100 vrais fans que 1000 « followers ».

Bande-annonce: vimeo.com/1017560556

Informations: travellingdistribution.com/film/himalia-583



Kinoarto kaj Esperanto: en la ombro de mistero

Dawid Musialik

En somero 2025 mi vidis Fejsbukan afiŝon pri la nova esploro pri la rolo de Esperanto en kinematografio por bakalaŭra tezo de Dawid Musialik el Pollando. Mi invitis lin rakonti pri la bazo de la esploro al la legantoj de tiu ĉi Lumo, dediĉita al la temo “kinoarto kaj Esperanto”! – Red.

La 25-an de junio 2025 realiĝis mia revo. Post tri jaroj plenaj je emocioj, mi defendis mian bakalaŭran tezon kiel historiisto. La temo de la tezo vekis sufiĉe da intereso, ĉar mi decidis ekzameni la rolon de Esperanto en kinematografio. Mi decidis fanfaroni pri mia atingo kaj faris afiŝeton en Esperanto-grupo, kaj mia plej granda surprizo estis la invito de s-ino Ĵenja Amis, de Kanada Esperanto-Asocio, verki artikolon en *Lumo*.

Kompreneble, mi ne povis rifuzi ĉi tiun proponon! Mi rakontos ankaŭ iomete pri mia intereso pri Esperanto kaj pri la esploroj pri Esperanto kaj la situacio en Pollando rilate Esperanton.



Mekko por Esperanto

Pollando ŝajne estas Mekko por Esperanto. La historio de nia lingvo komenciĝis en la pola lando, kie naskiĝis Ludoviko Zamenhof, kie li eldonis la Unuan Libron, kie okazis la unua konversacio en Esperanto, kie pli ol unufoje okazis Universala Kongreso, kie en pluraj urboj oni povas vidi ZEOjn, kie en mia denaska Varsovio ripozas en la Juda Tombejo la iniciatinto de Esperanto. Dume, laŭ miaj spertoj kaj observoj, ekzistas du

perspektivoj por kompreni la percepton, rekonon kaj memorojn pri Esperanto en Pollando.

Unue, mi konstatas, ke mi pli libere parolas pri la temo Esperanto kun homoj pli maljunaj ol mi: la

generacio de miaj gepatroj kaj geavoj. Ili ofte lernis Esperanton persone aŭ renkontis iun, kiu povis paroli en Esperanto. Aliflanke, mi renkontas multajn problemojn, kiam mi parolas pri la temo kun miaj geamikoj el “mia” aŭ pli juna generacio. Ofte ili entute ne scias, kio estas Esperanto. Ili estas tute surprizitaj, kiam mi mencias la ekziston de Pola Esperanto-Asocio, de UEA aŭ de la organizado de Universalaj Kongresoj. Kio plej ŝokas min persone estas, ke homoj surpriziĝas, ke ni, Esperantistoj, parolas unu kun la alia en Esperanto (jes!).

Mi pensas, ke la kaŭzo de ĉi tiu situacio estis la ŝanĝo de la politika reĝimo en Pollando. Kiam en la jaro 1989 en Pollando simbole falis komunismo, ŝanĝiĝis ankaŭ preskaŭ ĉiuj aspektoj de la vivo de la Poloj. Laŭ mia opinio, tio havis ŝlosilan influon ankaŭ sur Esperanto. En la tempoj de la Pola Popola Respubliko, eĉ se Esperanto ne akiris elstaran popularecon, tamen ĝi estis lingvo sufiĉe moda. En la tiutempa Pollando, kaŝita malantaŭ la Fera Kurteno, la partopreno en Universala Kongreso aŭ simila evento estis unu el malmultaj ŝancoj vojaĝi ekster la feran kurtenon – ekster la komunisman landon.

Aldone al tio, kiam Pollando estis elektita kiel gastiganto de la Universala Kongreso de 1987, la landa propagando tuj reagis kaj tiu renkontiĝo de

Esperantistoj fariĝis la temo de novaĵelsendoj. Kiam la komunista sistemo rompiĝis, Pollando komencis rigardi sopire al Okcidenta Eŭropo, kaj nia kulturo komencis “okcidentiĝi”. La Poloj, anstataŭ interesiĝi pri Esperanto, nature direktis siajn interesojn al la angla, kaj la temo de Zamenhofa laboro ne plu estis populara.

Esploraj defioj

Mi ne kaŝos, ke mi, kiel historia studento, ofte havas grandajn problemojn. En niaj studoj ni lernas kiel esplori (la vorto “historiisto” en si mem signifas “esploristo”). Ni analizas historiajn fontojn kaj surbaze de ili rekonstruas, rakontas kaj provas interpreti la pasintecon. Ofte niaj profesoroj estas bonegaj specialistoj en siaj kampoj kaj estas neanstataŭigeblaj helpantoj. Sed jen la problemo, kiun mi trafis: en mia fakultato, mi estas la sola homo, kiu minimume scipovas Esperanton. La plej multaj el miaj instruistoj havas ĝeneralan komprenon pri la temo, sed la studentoj devas esti tute memsufiĉaj: ekzemple, oni devas mem trovi fontojn, la literaturon, ktp. Kompreneble, en Pollando ekzistas kelkaj esploristoj pri Esperanto: ekzemple, Profesoro Walter Ŝelazny el la Universitato de Bjalistoko, doktorino Katarzyna Tempczyk el la Universitato de kardinalo Stefan Wyszyński aŭ doktorino Katarzyna Wojan el la

Universitato de Gdansko. Sed tamen la problemo estas, ke en nia Esperanta komunumo estas preskaŭ kompleta manko de historiistoj (efektive, la sola tia persono, pri kiu mi scias, estas la Germano Ulrich Lins verkinta la konatan libron *La Danĝera Lingvo*).

Krom tio, mi pensas, ke la temo de historio de Esperanto estas esplorata de sociologoj kaj lingvistoj, kaj iliaj esploroj estas koncentritaj sur historio de nia lingvo kaj de la Esperanta Movado. Do, ĉio ĉi donis la direkton al la ideoj de miaj sciencaj verkoj. Kun bonega helpo de mia tezkonsilisto, profesoro Maciej Wojtyński, mi venis al la konkludo, ke pli interesa temo, ol plia laboro pri la temo “Kiel Zamenhof imagis la idealan lingvon?”, estus la provo esplori, kiel la ekstera mondo reagis al Esperanto. Kiel la Esperantistoj provis popularigi la lingvon? Ĉu ĉi tio estis efika? Kion pri la lingvo pensis la “publiko”? Poste mi pensis pri la jeno: kiam ekestis Esperanto, ekestis ankaŭ la filmo. Filmo – la nova medio, kreita por la “masoj” – estas teorie ideala varbilo por la lingvo. Tiel formiĝis la temo de mia bakalaŭriĝa tezo.

La ŝablono “mistera Esperanto”

Ĉiam, komence de laboro pri ajna temo,

historiisto devas meti la unuan demandon: kiuj estos la fontoj. Tiam oni analizas la fontojn (en mia situacio, filmojn) kaj provas trovi en ili la plej gravajn informojn. Komence, mi pensis, ke mia laboro estos simpla. Mi rigardos Esperantan Vikipedion, serĉos filmojn, spektos ilin kaj priskribos Esperantajn fragmentojn en ili. Kaj jen la konkludoj estos simplaj: “Esperanto aperis en tiom da filmoj, kaj poste jen en tiom malpli, kun la malgrandiĝanta populareco de la lingvo”. Kiam tamen mi komencis spekti filmojn pli atente, mi rimarkis tre interesan fenomenon. Esperanto estis prezentita ne kiel lingvo internacia, kiu disvastigas mondan pacon kaj fratecon inter la nacioj, sed kiel rimedo “izoli” la scenon. Ekzemple, kiam la reĝisoro volis presenti en filmo ion nespecifan: misteran landon, tribon, nacion, ktp, fokusiĝante nur sur la fakto, ke ili estas fremdaj – tiam la reĝisoro uzis Esperanton. Esperanto vekis ankaŭ specifajn emociojn: izoladon, senposedigon, senton de mistero kaj teruro. Mi analizis en mia tezo dek plenlongajn filmojn el la jaroj 1926–1985. Duono de ili estas usonaj filmoj kaj la cetero el aliaj mondopartoj (ekzemple: Pollando, Hispanio aŭ Japanio). Malgraŭ la diverseco de la filmaj originoj, ĉiuj prezentis Esperanton kiel ion misterecan. La diferenco estis nur en la maniero, en kiu tio estis efektivigita. Mi nomis ĉi tiun fenomenon la ŝablono “mistera Esperanto”, kaj ĝi

evidente signife malsamas de la ideo, kiun ni esperantistoj havas pri Esperanto.

Ekzemploj de ŝablono

Pro la spaco, mi ne povas priskribi en mia artikolo ĉiujn filmojn el mia tezo, sed mi parolos pri kelkaj plej gravaj por mi. Unue, mi volas fokusiĝi pri la esperantaĵoj en la filmoj – t.e. pri la Esperantaj fragmentoj aŭdigataj aŭ montrataj en ili.


Ni komencas en Usono, kie en 1939 aperis la filmo *Idiot's Delight* de Clarence Brown, bazita sur la romano kun la sama titolo. Ĝi parolas pri cirkisto, Harry, kiu vojaĝadas tra Eŭropo kaj trafas kun sia grupo la franc-italan limon. En la filma adapto de la verko, provante eviti diplomatian skandalon, la agresanto en la konflikto prezentata en la filmo estas inventita lando – Monta Loda –, en kiu la oficiala lingvo estas Esperanto. *Idiot's Delight* estas filmo, en kiu la ŝablono estas escepte akcentita. Esperanto estas la lingvo, kiun la filmherooj ne komprenas kaj devas ne

kompreni. Tio fariĝas videbla, kiam okazas la unua kontakto de la herooj kun la lingvo, kiam ili ne povas interkonsenti kun la trajnaj pasaĝeroj. Post la eksplodo de la milito, la filmherooj estas translokitaj tien, sed ne estas informitaj pri tio, kio

okazas. Kaj kiam al la hotelo envenas montaloda oficiro por informi siajn soldatojn pri la milito (kompreneble, en Esperanto), la herooj tuj interrompas la konversacion kaj provas kompreni, pri kio parolas la oficiro, kaj provas eltiri iujn ajn informojn pri la situacio.

Idiot's Delight restas niĉa filmo, sed esperantaĵoj estas prezentataj ankaŭ en la plej popularaj filmoj. Ekzemplo estas la fama *La Granda Diktatoro* direktita de Charlie Chaplin. Chaplin volis internaciigi la aspekton de la judaj persekutoj, kaj li decidis uzi en la filmo

Esperanton. Tio aperas kiel la lingvo de la geto, kiu situas en la fikcia lando Tomania. Kiam la intrigo de la filmo moviĝas al la juda distriko, oni povas vidi multajn ŝildojn en Esperanto. Chaplin tamen modifas iujn vortofinojn por igi ilin aspekti similaj al la jida lingvo. Ekzemple, “Legoma kaj





frukta vendejo” transformiĝas al “Legomo & Frukto Vendejŭ”, “kafo” al “kafŭ”, aŭ “Tabakbutiko” al “Tabakbutiky”. En mia laboro en ĉi tiu momento mi faras sufiĉe groteskan supozon, ke tiamaniere Chaplin esence transformis la mision de Zamenhof, por kiu Esperanto unuigis sub unu lingvo la suferadon de la popoloj de la tuta Eŭropo.

Esperantaĵoj estas prezentitaj ankaŭ en la kinarto de mia denaska Pollando. La ĉi tie populara komedio *Nie lubię poniedziałku* (t.e. Mi ne ŝatas lundojn) el la jaro 1971 humure priskribas la aventurojn de multaj herooj dum la titola lundo. Kiam kelkaj el ili atendas en flughaveno la alvenon de fremdaj gastoj, oni povas vidi du esperantistojn

legantaj la gazeton *Heroldo de Esperanto*. Baldaŭ poste ili serĉas sian Esperantan kolegon inter la gastoj. Tiam vi povas aŭdi Esperant(ec)an dialogon inter ili: “Pardonu, sinjoro Scottland?” “Jes, *esta me!*” “Ni tre ĝojas! Bonvenon in Pollando!” (kompreneble, tiuj estas eraroj – mi skribis pri tio en la tezo). Surprize, multaj de Poloj ne scias, ke en ĉi tiu sceno estas uzata Esperanto. Ofte ili pensas, ke ĉi tio estas itala.

Mi volas pruvi la tutmondecon de la ŝablono kaj, fine, mi priskribos la japanan animaciaĵon – adaptaĵon de la novelo *Nokto de la Galaksia Fervojo*. La aŭtoro de la teksto estas Kenji Miyazawa, japana verkisto kaj, kio estas pli grava por ĉi tiu temo, esperantisto. Miyazawa ne parolis Esperanton flue, sed li estis simple fascinita de la ideo, kiun ĝi divastigas. Kiam 50 jarojn post lia morto Gisaburo Sugii decidis adapti lian rakonton,



li metis en ĝin Esperanton, por omaĝi sian forpasintan mentoron. La lingvo aperas en la animaciaĵo nur en la skriba formo: ĝi estas la lingvo de nekonata “eŭropa urbo”. Aldone, tranĉ-scenoj inter ĉapitroj estas dulingvaj – japana kaj Esperanta. Kio plej gravas, mi vidis en la filmo interesan fenomenon, kiun mi nomis “skemo de la ŝajna dulingvismo”. Per tio mi celas situacion, en kiu la filmherooj uzas unu lingvon skribe, dum ili daŭre parolas la alian. Tamen, ili ne konscias pri sia dulingveco en siaj mensoj, ili daŭre uzas unuecan, koheran lingvon, kvazaŭ la diferenco inter la lingvoj rezultiĝus nur el dublado. En *Nokto de la Galaksia Fervojo*, ĉi tiu ŝablono estas ekzempligita per la sceno, kie la ĉefherooj alvenas al konstruaĵo nomata *La Pliocena Marbordo*. Ili alproksimiĝas al ĝi kaj legas la ŝildon, sed faras tion en la japana.



Kenji Miyazawa



Konkludoj

La historio de Esperanto en filmarto estas interesa kaj turbulenta samtempe. Esperanto estas la lingvo uzita en la filmoj ne por antaŭenigi universalan egalecon, sed por internaciigi la scenon kaj veki specifajn emociojn. La filmoj, kiujn mi mencias ĉi tie, pruvas la kreemon de siaj reĝisoroj kaj ilian netradician aliron al sia laboro. Plej surpriza en la diskutitaj verkoj estas la universalismo de la ŝablono, kiu aperis esence tra la tuta mondo kaj, plej verŝajne, sendepende unu de la alia. Ankaŭ indas rimarki, ke la priskribita ŝablono ne malaperis post kelkaj jaroj (ekz., *Nokto de la Galaksia Fervojo*) kaj persistas ĝis hodiaŭ, ekzemple, en la filmo “Patrinoj” (nova finna filmo) de Anna Anderson. La uzo de Esperanto en la filmoj devenas de tio, ke oni volis emfazi universalan kontraŭmilitan temon, sen ligi ĝin al la spertoj de iu aparta lando.

Joseph R. Scherer, Hollywood *Esperantisto*

Jennifer Hill and Thomas Philo, Gerth Archives & Special Collections, California State University, Dominguez Hills

The Golden Age of Hollywood, spanning the 1930s and 1940s, brings to mind different things: the stars, the grand productions, glamour, music – and for many of us, Esperanto. This Golden Age marks one of the few times the universal language has been given an important place on the silver screen, most famously in the 1939 film adaptation of Robert E. Sherwood’s Broadway play *Idiot’s Delight*, and also the first of the Bob Hope/Bing Crosby “Road” pictures, *The Road to Singapore*. In both cases, Esperanto is used as a surrogate for the real language, substituting for Italian in *Idiot’s Delight*, and South Sea language in *Road to Singapore*.

These instances were well-documented at the time by the local press and have been addressed in historical accounts of Hollywood. But they generally focus on the circumstances surrounding the use of Esperanto rather than the language itself – the need to appease Mussolini by finding a substitute for Italian in *Idiot’s Delight*, for example, or finding something exotic for the

South Sea islanders to sing in what newspaper columnist Edwin Schallert names as *The Road to Singapore’s* “Native number.” [i]

But the press and scholarly accounts beg the question, why Esperanto? Even at its most popular, Esperanto has remained obscure to most of the public. How did studio executives even know about it, much less know enough to see its possibilities in two large-budget motion pictures? Yet, the articles seem to imply the creative heads came up with the idea themselves, then for help turned to the President of the Los Angeles Esperanto Club (and President of the Esperanto Association of North American), Joseph R. Scherer.

While it is correct to name Scherer as a key person in getting Esperanto on the silver screen for these films, The *J. Tilman Williams, Oazo de Esperanto, and Esperanto Club of Los Angeles Collection*, located at California State University, Dominguez Hills (CSUDH), along with contemporary issues of the Los Angeles Times



CLARK GABLE KAJ ANNA DEMETRIO

veturantaj en vagonaro en la Sennoma Lando (en la filmo « Idiota Militamuzo »). *La dikega kamparanino* ĵus diris : « Mi diras al vi, se la milito venos, ni restos ekster ĝi. Aliaj batalu inter si ĝis la morto. Estos des pli bone por ni. » (En Esperanto !) — *Clark Gable* pensas : « Mi ne komprenas vian belan muzikan lingvon ; sed tamen, via ŝultro estas tre taŭga por ripoziĝi sur ĝi mian lacan kapon. »

present a more nuanced view of Scherer's work. In short, accounts show Joseph R. Scherer to be not only the most important Esperantist in California and the United States during that period, but also a man who had spent nearly a decade tirelessly trying to bring Esperanto to the studios, raising their awareness of the universal language long before *Idiot's Delight* and *Road to Singapore*.

Joseph R. Scherer (January 24, 1901-July 20, 1967) was born in Fribourg, Switzerland before moving to Los Angeles, California in 1924. He was a banker by trade and was employed by the Seaboard National Bank in the Foreign Department.

From 1930 to 1932, Scherer traveled as a delegate for the International Central Committee of the Universal Esperanto Association (UEA). His travels took him to Indonesia, Japan, Hong Kong, and other countries, where he took hundreds of photographs. From the photographs, he created lectures about his travels, and spoke at colleges, schools, and social groups. Scherer also wrote a book about the countries he visited titled, *Ĉirkaŭ la Mondon kun la Verda Stelo*, published by *Heroldo de Esperanto*. He later wrote another book about his trip in this trailer through the United States called, *Tra Usono kun Ruliĝanta Hejmo*, also published by *Heroldo de Esperanto*.

In addition to traveling the world, Scherer also founded the Esperanto Klubo de Los Angeles and served as President of the Esperanto League of North America (Esperanto-USA) from 1935 to 1942. His accomplishments included doubling the membership of Esperanto USA and promoting the use of Esperanto in the Boy Scouts of America. In its "Where Can I Learn?" column of September 1,

1929, Los Angeles *Times* columnist Louise I. Temple chooses Esperanto as her subject, pointing readers to learn Esperanto at LA's Polytechnic High School, where an Esperanto class was to begin that month, taught by Joseph R. Scherer, free of charge. By 1932, the *Times* finds the American University opening a Department of Esperanto in the College of Liberal Arts, with Scherer the head of the department and, by implication, its primary instructor.

Scherer's arrival in Los Angeles in the 1920s coincided with a critical time in motion pictures – when the studios turned from silent films to “talkies.” With the advent of sound in movies, the studios faced a dilemma. Silent pictures were inherently exportable: the relatively few dialogue or descriptive inserts and credits could be filmed in any language and inserted into the dramatic action, with no need to re-shoot the actors. Talking pictures, though, had to be shot (or dubbed) into each of the different market languages, a costly proposition.

It would be wrong to say that Joseph R. Scherer originated the idea of using Esperanto as a solution. In a front-page 1928 story, Los Angeles *Times* critic Edwin Schallert reports on how studios plan to address Europe with talking films. Esperanto is mentioned as a possibility, with the



CLARK GABLE KAJ NORMA SHEARER
TOSTAS LA ESPERANTO-MOVADON

Dum la filmigo de « *Idiot's Delight* » la du famegaj filmsteloj de M.G.M. multe interesiĝis pri la neŭtrala internacia lingvo kaj pri ĝia granda valoro por la moderna mondo.

article citing its polyglot roots, as well as not being met with the same prejudice as English. Esperanto's main proponents mentioned include Hollywood luminaries Carl Laemmle, the co-founder and until 1934, head of Universal Pictures and director Clarence Brown (future director of *Idiot's Delight*).

While Joseph Scherer was on his world tour in the early 1930s for the Seaboard National Bank, Los Angeles Chamber of Commerce, and other businesses, he noticed the influence California had on the rest of the world, not only for its

products, but also for Hollywood. During this world tour, he also lectured about Hollywood and commented that his lectures related to Hollywood gathered the most attention. He brought 4000 slides with him about Los Angeles and Hollywood and told the Los Angeles Times in 1931, "Hollywood is our great salesman giving a reflected value to everything Californian. But its selling power may be vastly increased through just such efforts as I am engaged in." Not only did he see the value in California, and the Olympic Games being hosted in Los Angeles the following year, he also saw the value in Hollywood and movies. It's also possible that he saw the global influence Esperanto would have in the new "talkie" movies.

Given their documented interest in Esperanto, it is small wonder movie people also knew about Scherer, even before his world tour. The CSUDH collection documents his 1930 visit to Universal Pictures. Scherer is photographed with Lupe Velez on the set of "East is West," produced in 1930. Another photograph shows him with Carl Laemmle, who was a presenter for the film "East is West." As would often be the case when Scherer visits a studio, with both Velez and Laemmle, Scherer is photographed showing them a copy of *Heroldo de Esperanto*.

In the two major releases in which Esperanto appears, Scherer's presence in the studio grows. While he is not photographed with *Idiot's Delight's* stars or director, the CSUDH collection contains photographs of Clark Gable, Norma Shearer, and Clarence Brown, all inscribed in Esperanto (as though they were *Esperantistoj*).

The Road to Singapore shows Scherer's behind the scenes presence growing. The collection has an Esperanto-inscribed headshot of Bing Crosby, a letter to the Esperanto community (in the universal language) signed by the three stars, Crosby, Bob Hope, and Dorothy Lamour, a photo of Scherer sitting next to a sarong-clad Dorothy Lamour as she signs photos, and a high-end program about the music in the film, with special emphasis on "Kaigoon" (the Esperanto lyrics of which were probably translated by Scherer).

With both *Idiot's Delight* and later, *The Road to Singapore*, as the producers interviewed actors, Scherer was in the audition room listening to them try to speak Esperanto, and realizing they didn't know how to pronounce the words accurately, stepped in to help coach them. While he was definitely integral to both these films, Scherer received the recognition he deserved from the movie studios. In a 1939 letter to RKO from the British Esperanto Association, the writer

laments how *Idiot's Delight* credits omit any mention of Esperanto or Scherer's efforts. Regarding an upcoming film called *Conspiracy* (on which Scherer apparently also worked), the writer suggests a credit for Scherer, such as "Esperanto Adviser."

The last film represented in the collection is a "B" picture from 1941 titled *Raiders of the Desert*, starring Maria Montez, Richard Arlen, and Linda Hayes. There are Esperanto-inscribed publicity photos by Montez and Hayes, and a fun photo of Scherer and Arlen, with the leading man deep in thought as he "reads" a copy of *Heroldo de Esperanto*.

Along with some additional photos of Scherer with actors and studio personnel (including one possibly related to *Conspiracy*, which has a few lines of dialogue spoken in Esperanto), the CSUDH collection reflects his interest in Hollywood

through his many articles in *Amerika Esperantisto*, some of which give more extensive descriptions of his studio adventures. The collection likewise contains some of his articles about Hollywood in *Esperanto Internacia* and other Esperanto publications.

This article gives a brief summary of a time when mainstream Hollywood grew very interested in Esperanto, mainly through the efforts of Joseph R. Scherer. While it may be an accurate picture, it is an incomplete one. No doubt the archives of the various studios along with the personal papers of producers, directors, and stars could supplement the record presented here, and shine even more light on this very fascinating time in Esperanto history.

Dankon to *Literatura Foiro* for allowing us to use images from *Heroldo de Esperanto* in our article!



Joseph R. Scherer, la holivuda apostolo

Brandon Sowers



Scherer en Kalifornio, 1932.
Fonto: Bildarchiv Austria.

En la lasta numero, ni prezentis Morojon, la avino de rolkostumado, kiu debutis ĉe la Monda Foiro de Novjorko, en 1939. Dum la Monda Foiro okazis ne nur la unua monda scienc-fikcia kongreso, sed ankaŭ la usona Esperanto-kongreso, kie ŝi paradis en sia “futuristcostume.”

La nune prezentata losanĝelesa esperantisto estas rimarkebla, interalie, pro sia neĉeesto ĉe tiu kongreso. En sia raporto por tiu kongreso, la tiama Prezidanto, Joseph Scherer, petis pardonon ke li ne povis ĉeesti. Li raportis, ke post la sukcesa

uzo de Esperanto en la filmo *Idiot's Delight* (1939, MGM, kun Clark Gable kaj Norma Shearer), li sukcesis konvinki alian filmfirmaon (RKO) uzi Esperanton en nova filmo, *Conspiracy* (1940), kaj li devis resti en Holivudo por instrui Esperanton ĉe la studio.

Efektive, Scherer estis tre engaĝita en la propagando de Esperanto ĉe Holivudo (Hollywood) inter 1938-1941. Krom la menciitaj, li ankaŭ atingis ke la jenaj filmoj enhavu Esperanton: *Lady of the Tropics* (MGM, 1939, kun Heddy Lamarr), *Road to Singapore* (1940, Paramount, denove kun Bing Crosby, ankaŭ Bob Hope, Dorothy Lamour), kaj *Victory* (Paramount, 1940). Krome, en 1941, MGM produktis instrufilmon por soldatoj, en kiu la malamikaj soldatoj parolis Esperanton, por ne ofendi Germanujon aŭ Italujon (memoru, ke Usono estis ankoraŭ neŭtrala)¹. Efektive, en pluraj el tiuj filmoj, Esperanto estis uzita kiel lingvo de diktatoreca eŭropa lando, por ne ofendi ajnan specifan landon; post la eniro de Usono al la milito, tiu bezono ne plu ekzistis, kaj ŝajne tio estis

la fino de tiu ĉapitro de nia kino-historio.

Krom lia agado en Holivudo, Scherer estis tre aktiva prezidanto. Li elektiĝis en 1935, kaj restis ĝis 1942². Dum la unua jaro, li sukcesis duobligi la membraron de EANA. La numeroj de EA inter 1935-1942 montras plurflankan agemon kaj instigon de li al aliaj. Same, la fontoj kiujn mi esploris de aliaj losaŝelesaj esperantistoj ofte mencias la kuraĝigon kiun li donis al ili.

Li estis, kompreneble, aktiva en Esperantujo antaŭ kaj post sia periodo kiel prezidanto. Li naskiĝis en Svisujo, kie li lernis Esperanton kaj li ĉeestis la Universalan Kongreson en Nurnbergo en 1923. Li migris al Usono en 1924, kaj inter 1928-1930 li instruis Esperanton ĉe la Polytechnic High School de Los Aŝeleso (kiel oficiala instruisto), kaj li fondis la Esperanto-klubon de Los-Aŝeleso.

Inter 1930-1932 li vojaĝis tra 41 landoj, kaj verkis libron pri tiu sperto, “Ĉirkaŭ la mondo kun la verda stelo”. Kiam li revenis al Usono, li vojaĝis tra la lando dum pluraj en sia “Rolling Home Green Star”, preleganta pri siaj vojaĝoj kun lumbildoj. Li poste verkis libron ankaŭ pri liaj vojaĝoj en Usono nomita *Tra Usono kun Ruliĝanta Hejmo*. Ŝajnas, ke iam ĉirkaŭ 1935, li etendis radikojn en la grundon de Los-Aŝeleso kaj restis tie dum sia prezidant-dejoro (1935-1942) kaj poste.



Edward Kalmar kaj Joseph Scherer (Foto: *LA Times*, pere de *North American Esperanto Review*, Jan-Feb 1954)

Tiuj, kiuj bone konas nian historion, scias, ke Esperanto-USA dum longa tempo havis la nomon Esperanto-Ligo de Norda Ameriko (ELNA), kaj efektive nia asocio fondiĝis en 1952/1953, post kiam George Alan Connor akaparis EANA-n kaj eksmembrigis multajn membrojn kiel suspektatajn “komunistojn” aŭ simpatiantojn. (Memoru, ke temas pri la periodo de “McCarthyism”.) Iuj esperantistoj restis en EANA kun Connor, sed Scherer ne. En la *Historio de ELNA* (Vilĉjo Harmon, 2002), unu el la fondintoj de



Scherer ĉe la tria kongreso de ELNA, en San Diego.
Tria vico, tria de la dekstro. Fonto: Historio de ELNA

ELNA (Armin F. Doneis Sr.) memoris, ke Scherer estis inter tiuj kiuj multe helpis la novan asocion dum siaj fruaj jaroj.

Aparte kuriozan epizodon de tiu epoko mi trovis en la arĥivoj:

En la epizodo de *Art Linkletter's House Party* de Oktobro 29, 1953, gastis Edward Kalmar kun sia familio. Li rakontis pri kiel Esperanto savis lian vivon: Kalmar estis en koncentrejo dum la dua mondmilito, kaj kiam hazarde venis italo kiu bezonis interpretiston, Kalmar povis interpreti por li – uzante Esperanton!

Post la milito, Kalmar restis en Polujo, ĝis li lernis en 1948 ke la nova komunista registaro volis aresti lin. Li apenaŭ eskapis, restis en Svedujo kelkajn jarojn (ĉe Esperantistoj), kaj fine sukcesis fuĝi al Usono pro la helpo de Joseph Scherer!

La lasta publika apero de Scherer en Esperantujo kiun mi povis trovi estis de 1955, kiam li partoprenis la trian kongreson de ELNA, en San Diego.

La Historio de ELNA ankaŭ mencias, ke inter ĉio alia, li estis gravulo en la skoltaj (Boy Scouts of America) kaj multe propagandis la merit-ordenon pri Esperanto.



Scherer mortis en 1967. Sed lia legaco daŭras en nia movado en Usono, kaj aparte en nia aktuala agado pri filmoj.

¹ Ĉu tio povus esti la sprono de la bone konata manlibro *Esperanto: The Aggressor Language*?

² Kurioza koincido: La posta prezidanto, D-ro Cecil Stockard, loĝis dum kelkaj jaroj en Atlanto. Antaŭ kelkaj jaroj, lia nepino mesaĝis nian klubon, kaj ni ricevis de ŝi plurajn kestojn kun liaj arĥivoj!

Tiu ĉi artikolo aperis en Usona Esperantisto, majo 2023, anticipe al la Usona Landa Kongreso en Losanĝeleso (2024).

Literatura Vivo: nova (senpaga!) revuo en Esperanto!

Literaturemuloj eble rimarkis aperon en 2025 de nova moderna revuo en Esperanto: *Literatura Vivo*! Redaktite de Erika Godó (Hungario) kaj nia propra John Huang (Kanado), nova estrarano de KEA. En la novembra numero aperis mia propra intervjuo kaj ekskluziva elĉerpaĵo de la teksto el la preparata libro "1910". La slogano de la revuo estas "Poemoj, prozo, kantotekstoj kaj intervjuoj – monato post monato!" Legu kaj kontribuu! — Red. Pliaj informoj: literaturavivo.com

ISSN 2819-4861
Redaktantaro







Numero 005
Novembro 2025



Esperanto kaj la “universala lingvo” de kino en *Najbaroj*

Alessandra Madella

Certe ĉiuj legantoj de *Lumo* jam scias, ke Norman McLaren (1914-1987) realigis por la Nacia Filmoficejo de Kanado (NFO) la mallongan animacion *Najbaroj*

(*Neighbours/Voisins*, 1952), inkludante je la fino la Esperantan frazon “Amu vian najbaron.” La simpla intrigo de du najbaroj, kiuj mortigas unu la alian pro sia deziro posedi parfumegan floron, kiun ili povus tute same kune ĝui, bone akordiĝas kun la kerna pacemo de la lingvo de Ludoviko Zamenhof (1859-1917), kiun McLaren lernis en sia junaĝo. Fakte, li parolis plurajn lingvojn kaj mem kreis sian propran (McWilliams, 2020b). Sed eble en lia uzo de Esperanto en *Najbaroj* ni povas senti ankaŭ la eĥojn de



esploroj, kiuj metafore aplikis la universalecon de Esperanto al la universale ikona kaj mova lingvo de kino. Tiu ideo, precipe en sia eŭropa versio,

certe influis la junan McLaren, kiu konatiĝis kun avangardaj kaj impresionismaj esploroj dank’ al komisaro John Grierson (1898-1972), unue ĉe la Ĝenerala Poŝtoŝefo de Britio kaj poste ĉe NFO. Se Esperanto kiel lingvo de paco



substreki la mesaĝon de *Najbaroj*, tiu “universala lingvo” de bildoj kaj movo montris al McLaren la eblon forme konkretigi ĝin.

Tiu “universala lingvo” de kino havas longan historion. La Holivudo de la silenta periodo

valorigis la “kinartan Esperanton” (*cinematic Esperanto*) de la usona poeto Vachel Lindsay (1879-1931), siavice inspiritan de la reĝisoraj eltrovoj de D.W. Griffith (1875-1948) kiel “kontinueca muntado.” Ĝia facile komprenebla “lingvo” de bildoj kaj movo kaj ĝia glata rakontmaniero helpis enmigrintojn pli rapide usonaniĝi enlande, dum la negativaj efikoj de la Unua Mondmilito rilate al film-produktado en Eŭropo malfermis al hollywoodaj studioj

novajn tutmondajn merkatojn (Madella, 2017b, 2019a, 2021). Kiam Charlie Chaplin (1889-1977) uzis Esperanton por la geto de *La Granda Diktatoro* (1940), kiu estis lia unua tuta sonfilmo, li pensigis pri la persekutado de la judoj, la gento de Zamenhof. Sed li ankaŭ volis iel gardi por ĝia kontraŭ-nazia mesaĝo la universalan atingon de silenta pantomimo, kiu ĝis tiam lia sukcesa rolo de vagabondo simbolis, sed kiu riskis perdiĝi en

sonfilmoj pro la uzo de etnaj lingvoj. Fakte, naziaj politikoj endanĝerigis ne nur judojn (Madella, 2019).

Sed ankaŭ en Eŭropo la metafora ligo kun Esperanto allogis kinistojn, komencante de la francaj pioniroj. Louis Lumière (1864-1948) konsideris filmojn ilo por monda paco kaj

progreso, dum Léon Gaumont (1864-1946) filmis la instruadon de la internacia lingvo kaj Zamenhof mem, kiel modelon de prononco. Gaumont Palace, la plej



granda kinejo el la mondo, devintus gastigi la dekan Universalan Kongreson de Esperanto en Parizo, malebligitan de la Unua Mondmilito. La franca verkistino Colette (1873-1954), kiu interalie filmverkis la francan version de la germana *Mädchen in Uniform* (*Junulinoj en uniformo*, 1931), en siaj pioniraj filmkritikoj komparis kinon al Volapuko pro la vasta internacia kompreneblo

de ĝiaj intrigoj. En 1923 la impresionisma reĝisoro Abel Gance (1889-1981) vokis kinon “la bilda Esperanto” (*l’espéranto de l’image*), dum en 1930 Jean Cocteau (1889-1963), proksima de la superrealistoj, evokis la “supernaturan esperanton de la bildoj” (*l’espéranto surnaturel des images*) (Centassi & Masson, 1995; Plasseraud, 2011).

Sed verŝajne la plej granda influo sur la juna McLaren venis de homoj, kiuj interesiĝis pri animacio.

Moviĝantaj bildoj havis pioniran rolon en la klopodo liberigi

kinarton de kulturaj paroĥismoj kaj de la serva imitado de la deknaŭjarcenta okcidenta teatro. Animacio ne estis nur amuzilo por infanoj, sed




ankaŭ povis iĝi serioza esplorado de la apartaj ebloj de la nova arto. Viking Eggeling (1880-1925), sveda pentristo ligita al dadaismo kaj aktiva en Germanio, turniĝis al animacio por atingi ne nur universalan kompreneblon, sed ĉefe universalan lingvon de arto, kiu kapablu kunigi ĉiujn artformojn en tutan artverkon (germane, *Gesamtkunstwerk*) (Bertetto, 1983). McLaren sin prezentis kiel la heredanton de modernismaj artistoj de la tridekaj jaroj, kiel la germana Oskar Fischinger (1900-1967), la aŭtoro de la unua abstrakta animacio, kiun li spektis, aŭ la hungara László Moholy-Nagy (1895-1946).

Kun Fischinger li havis respektoplenajn rilatojn ankaŭ poste, dank’ al la komuna intereso pri sinteza sono (McWilliams, 2020c). La homo, kiu

plej multe inspiris la junan McLaren estis tamen la nov-zelanda animaciisto Lenn Lye (1901-1980), lia kolego ĉe la Ĝenerala Poŝtoŝejo antaŭ la dua mondmilito, kiu pentris sur la filmbendon mem, kiel McLaren revis fari (McWilliams, 2020c). Ankaŭ ĉe NFO multas la vizitantoj ligataj al la eŭropa avangardo de la animacia mondo, kiel la germana Lotte Reiniger (1899-1981) kaj la rusa Alexander Alexeiev (1901-1982), el kiu McLaren aĉetis la pingl-ekranon ankoraŭ uzatan en la Nacia Oficejo de Kanado, nuntempe fare de la kanada animaciistino Michèle Lemieŭ (Lemieŭ, 2019).

Kiel tiuj majstroj de la eŭropa avangardo, McLaren ne volis fari parolajn animaciojn, ĉar li pensis, ke etnaj lingvoj ligiĝas al specifaj kulturoj kaj mondovidoj, limigante la kompreneblon de la mesaĝo. Sed li multe interesiĝis pri movo kiel speco de “universala lingvo”, kiun ĉiuj homoj povas kompreni, sendepende de la specifaj objektoj, kiujn oni montras (McWilliams, 2020a). Ankaŭ la novigaj teknikoj de *Najbaroj* legeblas el tiu vidpunkto. La animacio uzas piksiladon (*pixilation*), t.e. halt-mova animacio (*stop-motion animation*), de veraj homoj, sed ankaŭ de objektoj (la palisaro, la flava floro, ktp), kiuj unuiĝas en mesaĝo de paco dank’ al sia same stranga mov-maniero. *Najbaroj* ankaŭ



eksperimentas kun la universala atingo de sintezaj sonoj, produktataj pere de ondformaj lineoj rekte fotografitaj sur la son-bendon de la filmo, substrekante la absurdan situacion, kiu povas porti al milito pro bagatelaĵo. En mondo detruibla de atombomboj, tiu kerna mesaĝo devas esti nepre komprenebla de la tuta homaro.

Konklude, *Najbaroj* kunmetas mesaĝon en Esperanto pri la dezireblo de pacaj homaj rilatoj kun forma esplorado de vid- kaj son-teknikoj cele al tiu “universala lingvo” de animacio, pri kiu revis eŭropaj avangardoj por renovigi kinarton ĝenerale. Ĝi uzas la similecon de movo inter homoj kaj objektoj kaj sintezajn sonojn por ironie substreki la ĝeneralajn konsekvencojn de la sensenca agado de fanatike akiremaj homoj, kiu povus porti eĉ al atombomba detruo de nia tuta mondo.

Bibliografio

BERTETTO, Paolo (red.) *Il cinema d'avanguardia 1910-1930*. Venezia: Marsilio. 1983.

CENTASSI, René & Henri Masson. *L'Homme qui a défié Babel*. Paris: L'Harmattan. 1995.

LEMIEŬ, Michèle. "Arto sen malfara klavo-
Intervjuo al Michèle Lemieŭ." Ĉina Radio
Internacia (ĈRI). 18-12-2019: [http://
esperanto.cri.cn/2521/2019/12/18/241s208425.h
tm](http://esperanto.cri.cn/2521/2019/12/18/241s208425.htm)

MADELLA, Alessandra. "La granda diktatoro kaj la
historio de la metaforo de kinarta Esperanto."
*Internacia Kongresa Universitato. Sanmarineca
Universitata Sesio*. Moscow: Impeto: 86-101.
2019: <https://uea.org/pdf/IKU/IKU2019.pdf>

MADELLA, Alessandra. "Esperanto in Vicini di
Norman McLaren, *Uni-Versum*, n. 27-28, 2018: 29
-31.

MADELLA, Alessandra. "La granda diktatoro kaj la
historio de la metaforo de kinarta Esperanto."
*Internacia Kongresa Universitato. Sanmarineca
Universitata Sesio*. Moskvo: Impeto. 2019: 86-
101.

MADELLA, Alessandra. "La "Esperanta kinarto" de
Vachel Lindsay." ĈRI. 07-06-2017b: [http://
esperanto.cri.cn/2521/2017/06/07/241s193523.h
tm](http://esperanto.cri.cn/2521/2017/06/07/241s193523.htm)

MADELLA, Alessandra. "La ĉina kaj Esperanto en

Najbaroj de Norman McLaren." ĈRI. 18-1-2017a: [http://
esperanto.cri.cn/2521/2017/01/18/241s191001.h
tm](http://esperanto.cri.cn/2521/2017/01/18/241s191001.htm)

MADELLA, Alessandra. "La ĉina kaj Esperanto en
Najbaroj de Norman McLaren." *Panorame*. 2016:
12-14, 19.

McWILLIAMS, Donald. "Norman McLaren: La
animaciista majstro, kiu scipovis Esperanton." ĈRI.
05-13-2020a: [http://
esperanto.cri.cn/2521/2020/05/10/180s210545.h
tm](http://esperanto.cri.cn/2521/2020/05/10/180s210545.htm)

McWILLIAMS, Donald. "Dua parto: Norman
McLaren: Lingvoj, Esperanto kaj matematiko."
ĈRI. 05-20-2020b: [http://
esperanto.cri.cn/2521/2020/05/20/180s210712.h
tm](http://esperanto.cri.cn/2521/2020/05/20/180s210712.htm)

McWILLIAMS, Donald. "Tria parto: Norman
McLaren: Influoj, pasioj kaj la tango." ĈRI. 05-27-
2020c: [http://
esperanto.cri.cn/2521/2020/05/27/180s210846.h
tm](http://esperanto.cri.cn/2521/2020/05/27/180s210846.htm)

PLASSERAUD, Emmanuel. *L'art des foules: Théories
de la réception filmique comme phénomène
collectif en France (1908-1930)*. Villeneuve
d'Ascq: Presses universitaires du Septentrion.
2011.

Traduko, Desegno kaj Presado:

Kion mi lernis eldonante libron

Jordan Zero

Fono

En Novembro 2022, La Esperanto-Asocio de Britio (EAB) lanĉis du tradukokonkursojn. Unu el ili, *nova talento*, estis por tiuj kiuj neniam antaŭe finis tradukprojekton. Mi je tiu tempo estis ege malsperta tradukonto, sed ĉiuokaze, decidis fari la konkurson por ekzerci mian Esperanton (bonŝance nun mi nur estas ete malsperta tradukinto). La konkursantoj devis traduki la unuan ĉapitron de *Matilda* de Roald Dahl. Krom la tuja famo, eterna gloro, kaj porĉiama riĉeco, kiujn venko de Esperanta tradukokonkurso portus, la traduko de la gajnonto ankaŭ estis eldonota de EAB.

Evidente, mi ne estis la gajninto de tiu konkurso (noto 1), sed kvankam mi ne gajnis premion, mi ja gajnis la *tradukan febron*; tio estas, ege kontaĝa malsano de kiu longtempe suferis Esperantujo.

Ĉar tradukadon mi ĝuis tiel multe, mi decidis ke mi ŝatus klopodi traduki alian infanan libron,

pensante ke tia estu pli facile tradukebla por nova tradukanto (kroma lernaĵo, *nenio* estas facile tradukebla!), do mi serĉis taŭgan infanlibron.

Mi volis traduki ion kio estas sufiĉe populara, por ke homoj ja volus legi ĝin; kaj ion kio ne estis tradukita esperante antaŭe, por ke mi ne havu modelon aŭ povu kopii ĝin senintence. Finfine mi malkovris ke la verkaro de C. S. Lewis estas publika havaĵo, kaj mi povus traduki unu el liaj libroj kaj ne devus zorgi pri tradukrajtoj post kiam mi finos la tradukon kaj volus disdoni ĝin.

Kiam mi komencis traduki la tekston, mi supozis ke ĝi estas publika havaĵo preskaŭ tutmonde. Sed iam, dum mia tradukado, mi eksciis ke tio ne veras. La verkaro de C. S. Lewis ja estas publikhavaĵo en Kanado, sed ne en multaj aliaj landoj tra la mondo.

Antaŭe, kopirajto en Kanado daŭris la vivon de la kreinto kaj 50 jarojn post morto, kiel diktis en 1886 la Konvencio de Berno. Tamen, ekde tiam

multaj landoj decidis plilongigi siajn postmortajn kopirajtajn daŭrojn pli alte ol la 50-jara minimumo de la Berna Konvencio al 70 jaroj. Kanado ŝanĝis sian kopirajtan daŭron nur lastatempe, je la fino de 2022, pro la Kanada-Usona-Meksika Interkonsento.

Kvankam Kanado nun havas 70-jaran kopirajtan daŭron post la morto de la kreinto, ne eblas eltiri ion kio jam havas kopirajtan protekton el la publika havaĵaro, do, ekzistas sufiĉe granda verkaro kiu estas publika havaĵo en Kanado sed ne jam aliaj landoj.

Mi celis fini kaj presi la libron por la Dulanda Kongreso 2025 en Toronto, por ke tie la libro estu aĉetebla. Mi ne certis pri kiom da homoj interesiĝus pri infana libro, tradukita de freŝbakita tradukisto, do mi nur presis kvin ekzemplerojn. Tamen mi povas feliĉe raporti ke tiuj kvin ekzempleroj estis forvenditaj tre rapide, ene de unu horo de la malfermo de la kongresa bazo. Evidente mi devos presi pli da libroj venontfoje.

Tradukado

Teni grandan tradukon en ordo ne estas facile, sed estas komputilaj programoj kiuj povas helpi organizi tradukan manuskripton. Mi uzis la

programon *OmegaT* kiu estas tradukmemorilo. Tradukmemoriloj ne tradukas tekston, sed ili memoras kiel la tradukanto tradukis fragmentojn antaŭe por ke la tradukanto ĉiam uzu la saman tradukon.

Kontroli gramatikajn kaj literumajn erarojn evidente gravas, precipe por Esperantistoj, do mi ne diras multe pri tiu temo. Mi nur mencios ke mi uzis la dokumentilon *LibreOffice* (eĉ por ĉi tiu artikolo!) ĉar ĝi havas tre bonan Esperantan literuman kontrolilon kiu kaptis multajn erarojn. Pri gramatiko, kvankam estas iloj kiel *LingvoHelpilo*, kiuj iĝas pli kaj pli bonaj, ankoraŭ ne ekzistas sendube fidinda gramatika kontrolilo por Esperanto. Ĉiuokaze, provleganto por ajna tradukprojekto estas enda, do mi estas tre dankema ke Detlef Karthaus konsentis provlegi mian manuskripton kaj donis multe da bonaj konsiloj pri ne nur la teksto, sed ankaŭ la fako de tradukado mem.

Librodesegno

Kovrilo

Ĉu oni taksu libron laŭkovrile? Ne. Sed, malgraŭ la noblaj celoj, la homa cerbo estas senkonscie *ege* antaŭjuĝema. Do, kompreneble, la plej grava desegna elemento por libro estas la kovrilo.

Desegni allogan kovrilon, estis pli malfacile ol traduki tekston, por mi. Mi ne estas artisto, kaj tute ne sciis ion ajn pri la desegno de librokovriloj. Por lerni el kio konsistas bona kovrilo, mi eltiris librojn el mia bretaro, kiuj laŭ mia opinio havas allogajn kovrilojn, kaj studis iliajn desegnojn.

Mi opinias ke bona librokovrilo uzas simbolojn de la rakonto por instigi homojn malfermi la libron kaj malkovri la signifon de tiuj simboloj.

Bonŝance *La Leono*, *La Sorĉistino kaj La Vestoŝranko*

enhavas multajn signifohavajn simbolojn kiuj povis esti montrataj sur la kovrilo. Mi decidis meti la Leonon sur la antaŭan kovrilon, Patron Kristnaskon kun siaj boacoj sur la

malantaŭan kovrilon, kaj la Stratolampon sur la librodorson. Mi ornamis la kovrilon per reĝec-aspekta bordero por pli bone kapti epokan etoson.



La kovrilo. Senverdaj kovriloj elstaras multe en esperantaj libroservoj!

Ĉu la koloroj aspektas iom malbrile? Por kolore presi libron (aŭ fakte, ion ajn papere), necesas kompreni kial koloroj aspektas malsimile sur ekrano kompare kun inko kaj papero. Ekranoj uzas kolormodelon “Ruĝa-Verda-Blua” (RVB); tamen, presiloj uzas kolormodelon “Cejana-Maĝenta-Flava-Nigra” (CMFN).

RVG estas “adicia metodo”. Ekranoj produktas kolorojn per adicio de diversaj kvantoj kaj intensecoj de ruĝa, verda, kaj blua lumo. CMFN estas “subtraha metodo”. Papero, evidente, ne

radias lumon. Ĝi nur povas sorbi kaj reeligi la lumon kiu frapas ĝin. Tial, papero uzas inkon por “subtrahi” la koloron de la blanka paĝo sorbante kaj reeligante kolorojn laŭnecese.

Pro tio, CMFN ne kapablas krei la saman spektron de koloroj kiel RVB.

Ekzistas pli da koloroj en la RVB-spekto ol en la CMFN-spekto. Tial, oni povas desegni bildon per komputilo kies koloroj aspektas malsimile kiam presita. Por eviti tiun problemon, oni devas certigi ke la desegno estas kreita sub la CMFN-reĝimo. La plimulto da bildredaktiloj havas tiun agordon, sed ĝi ofte ne estas la defaŭlta agordo.

Tekstostilo

Tiparo

Finfine, post kiam iu taksis la kovrilon sufiĉe bela, kaj decidis malfermi la libron, tiu espereble

eklegos la vortojn. Jen la sekva desegnodecido. Ekzistas multe da tre belaj tiparoj, kaj nuntempe pli kaj pli da tiparoj estas tute uzeblaj por Esperantaj tekstoj pro modernaj konvencioj kiuj devigas subtenon por ĉapelitaj literoj. Do, la

problemo ne plu estas ĉu mi iam ajn povos trovi belan tiparon kiu uzeblas esperantlingve, sed ĉu mi iam ajn povos elekti iun el la amaso da tiparoj?

Feliĉe mi jam havis ideon pri la tiparo kiun mi volis uzi. Antaŭ

kelkaj jaroj mi renkontis la tiparon *Atkinson Hyperlegible* kiu estas kreita de la *Braille Institute* por homoj kun vidmalsano. La tiparo havas lerte desegnitajn literojn kaj numerojn por ke la formoj estu facile distingeblaj kaj legeblaj por homoj kiuj ne vidas bone. Ekzemple, ĉu vi iam vidis formon kiun vi ne povas distingi ĉu ĝi estas la numero unu aŭ majuskla *I* aŭ minuskla *L*? Tiaj problemoj ne ekzistas kun alirebleca tiparo kiel Atkinson



Facile legeblaj, eĉ se iu vidas neklare.

Eĥoŝanĝo ĉiuĵaude

Apenaŭ rimarkeble, sed notu la larĝecon de la ĉapelitaj literoj.

Hyperlegible. Estas multe pli da ekzemploj pri kiel specife la tiparo faciligas legadon por homoj kun vidmalsano kaj mi ege [rekomendas](#) ĉi tiun filmeton de Linus Borman por kompreni kiom multe da aferoj oni devas konsideri desegnante tiparon.

Mi ofte uzas la tiparon por dokumentoj en mia profesia vivo, do mi volis uzi ĝin por faciligi la legadon de la libro. Tamen, kvankam eblas ĉapeli literojn per tiu tiparo, ial la ĉapelitaj literoj aperas iomete pli larĝaj ol la neĉapelitaj, sed nur kiam oni dikigas la tiparon. Kvankam la tiparo plejparte aspektas tre bone, kiam ajn estus rubrikoj, aŭ aliaj dikaj literoj, la ĉapelitaj literoj ne aspektus ĝuste.

Mi preskaŭ rezignis pri tiu tiparo sed mi malkovris variaĵon de la tiparo kiu subtenas akcentitajn literojn pli bone *Lexica Ultralegible* kaj uzis tiun tiparon por la teksto de la libro.

Evidente la kovrilo uzas multe pli ornamitan tiparon, *Hello Paris*. Ironie, tiu tiparo havas tute

malan celon ol la tiparo de la teksto, sed mi ne elektis ĝin pro ĝia legebleco, sed pro ĝia beleco. Ĝi ne estas tre facile legebla, sed mi taksas la formojn de la literoj tre belaj kaj mi vetis ke tio allogus homojn tiel ke ili aĉetu la libron de la libroservo. Mia plej ŝatata aspekto ĉe tiu tiparo estas la nombro da *ligaĵoj* inter literoj. Rigardu kiel la finaĵo *O* de “vestoŝranko” sidas sur la kurbo de *K*, aŭ kiel la majuskla *L* ĉiam etendiĝas sub la sekva litero, sed la minuskla havas malsaman formon, sed ankoraŭ etendiĝas sub la sekvaj literoj, kiel en la nomo C. S. Lewis. Mi miksis la uzon de majuskla kaj minuskla literoj ĉar tiel la teksto aperas pli manskribita.

Aranĝo

Paĝoj

Se vi jam havas la tekston, kovrilon kaj tiparon, venas la tempo aranĝi la tekston sur la paĝoj. Unue, oni devas elekti la grandecon de la libro. Estas bona ideo esti tute certa pri la grandeco de la libro, ĉar kiam oni ŝanĝas la grandecon de la libro, ĉio kion oni jam aranĝis devas esti refarita. Mi elektis iom tipan grandecon por mia libro: 5" × 8".

Komprenenda fakto pri tekstaranĝo estas kiel *aversaj* kaj *reversaj* paĝoj efikas sur la aranĝo. Aversa paĝo estas la antaŭa flanko de folio, kaj

Post momento ŝi trovis ke kio frotis ŝian vizaĝon kaj ŝiajn manojn ne plu estis mola felo sed io malvola kaj malglata kaj eĉ pikema. "Nu, ĝi estas kiel branĉoj de arboj!" kredis Lucy. Kaj tiam ŝi vidis ke estis lumo antaŭ ŝi; ne kelkaj koloroj antaŭe kie la fino de la vestoŝranko devus esti, sed tre malproksime antaŭe. Io malvarma kaj malmola estis falanta sur ŝin. Post momento ŝi trovis sin en centro de arbaro je nokto kun neĝo sub la piedoj kaj neĝeroj falantaj tra la aero.

Lucy sentis sin iom timigita, sed tre sciema kaj ekscitita ankaŭ. Ŝi retrorigardis super la ŝultro kaj tie, inter la malhelaj trunkoj, ŝi ankoraŭ povis vidi la malfermitan pordon de la vestoŝranko kaj eĉ videti la malplenan ĉambron de kie ŝi venis. (Ŝi, kompreneble, lasis la pordon malfermita, ĉar ŝi sciis ke estas tre stulte enfermi sin en vestoŝrankon). Ŝajne ankoraŭ estis taglumo tie. "Mi povus ĉiam reveni se io malbona okazas," pensis Lucy. Ŝi komencis marŝi antaŭen, *krak-krak*, super la neĝo kaj tra la arbaro al la alia lumo.

Post ĉirkaŭ dek minutoj ŝi atingis ĝin kaj trovis ke ĝi estis stratolampo. Dum ŝi staris rigardante ĝin, pripensante kial estas stratolampo en la centro de arbaro, kaj pensante kion ŝi faru sekve, ŝi aŭdis paŝojn alproksimiĝantajn. Kaj baldaŭ post tio stranga persono elaperis el la arboj kaj en la lumon de la stratolampo.

Li estis nur iomete pli alta ol Lucy mem kaj li portis super la kapo ombrelon, blanka pro la neĝo. De la talio supren li estis kiel viro, sed liaj kruroj estis kaproformaj kun brile nigraj haroj kaj anstataŭ piedoj li havis kaprajn hufojn. Li ankaŭ havis voston, sed Lucy ne rimarkis tion tuj ĉar ĝi restis nete sur la brako kiu tenis la ombrelon por ke ĝi ne treniĝu sur la neĝo. Li havis ruĝan lanan koltukon ĉirkaŭ la kolo kaj lia haŭto estis iomete ruĝa ankaŭ. Li havis strangan, sed afablan malgrandan vizaĝon kun mallonga pinta barbo kaj bukla hararo, kaj el la hararo elstaris du kornoj, unu sur ĉiu flanko de sia frunto. Unu el liaj manoj, kiel mi diris, tenis la ombrelon: kaj en la alia li portis kelkajn brunajn pakojn. Kun la pako kaj la neĝo li aspektis kvazaŭ li faris Kristnaskan butikumadon. Li estis Faŭno. Kaj kiam li vidis Lucy li estis tiel surprizita ke li faligis ĉiun pakon.

"Ho vel!" ekkriis la Faŭno.

Reversa (maldekstra) kaj aversa (dekstra) paĝoj.

em ipsum dolor sit amet, consectetur
piscing elit. Pellentesque viverra
nunc. Nam sed nisl nec elit susc
llamcorper. In leo ante, venenati
utpat ut, imperdiet auctor, enim. I
avida. Suspendisse molestie sem
esent a lacus vitae turpis consec
mper. Integer porta. Donec sit am
esent a eros. In hac habitasse pl
ctumst. Suspendisse fermentum.
em ipsum dolor sit amet, consect

Ekzempla tipografia rivero. Notu la blankan kolumnon ene de la alineo.

If a single word or very short line of copy is left at the end of a column, it is called a widow.

Likewise, if a single word or a very short line of copy appears at the top of the following column, it is called an orphan.

Both of these

Orphan

are considered bad typography, because they create distracting shapes in a block of type. They can usually be fixed easily in the same way as the rag: by reworking the line breaks in the column or by editing the copy.

If a single word or very short line of copy is left at the end of a column, it is called a widow.

Likewise, if a single word or a very short line of copy appears at the top of the following column, it is called an

orphan.

Both of these are considered bad typography, because they create distracting shapes in a block of type. They can usually be fixed easily in the same way as the rag: by reworking the line breaks in the column or by editing the copy.

Widow

Vidvino kaj Orfo — ekzemplo.

reversa paĝo estas ĝia malantaŭa flanko. Por desegni belan facile legeblan libron, tiuj paĝoj devas esti aranĝitaj iom malsimile.

La *kanalo* estas la centra marĝeno ene de libro. Bone aranĝita libro ne havos la samajn marĝenojn por la aversaj kaj reversaj paĝoj. Ĉar la plimulto da libroj ne malfermiĝos tute ebene, teksto kiu estas tro proksima al la kanalo ne estas facile legebla. Pli bonas havi pli larĝan centran marĝenon por ke teksto ne falu en la kanalon, tio signifas ke aversaj paĝoj devas havi pli larĝan maldekstran marĝenon kaj reversaj paĝoj devas havi pli larĝan dekstran marĝenon.

Nun, mi devas konfesi ke mi sekrete kaŝis ion ene de mia libro. Ĉar vi ankoraŭ legas mian artikolon, vi meritas scii. Sed, bonvolu ne sciigi aliulojn. La sekreto estas inter paĝoj 33 kaj 34. Ĉu vi trovis ĝin? Ne? Eble kontrolu alian libron. Ankoraŭ ne? Ĉu vi jam rekonas la ruzon? Ĉar la unua paĝo estas aversa, ĉiu aversa paĝo havos neparan paĝnombron kaj ĉiu reversa paĝo havos paran nombron. Tial, ne eblas kaŝi ion ajn inter la paĝoj 33 kaj 34. Kelkfoje kiam iu aldonas titolajn paĝojn aŭ aliajn paĝojn antaŭ la komenco de libro (kopirajtpaĝoj, informo pri la eldono, ktp) tiu forgesas certigi ke la paĝnombroj de la aversaj kaj reversaj paĝoj ankoraŭ estas en ordo.

Ne ĉiuj libroj havas aŭ bezonas paĝrubrikojn sed

mi trovis ke sen ili la paĝoj aperas tro malplenaj, do mi aldonis ilin. Mi metis la titolon de la libro sur la reversa paĝo kaj la verkistan nomon sur la aversa paĝo.

Tipografio

Post kiam oni estas certa ke la teksto estas perfekte enpaĝigita, endas kontroli tipografiajn erarojn.

Dum provlegado de la teksto, oni serĉu *Vidvinojn* kaj *Orfojn*. Tiuj estas la nomoj donitaj al linioj kiuj aperas solaj sur alia paĝo ol la alineo al kiu ili apartenas. Modernaj tekstprilaboriloj aŭtomate strebos ne krei tiujn erarojn, sed kelkfoje ili estas neeviteblaj. Forigi tiujn erarojn ne estas facile sen ŝanĝi la tekston mem, sed kelkfoje oni povas fari tre etajn, apenaŭ rimarkeblajn ŝanĝojn de la spaco inter vortoj aŭ inter literoj ene de antaŭaj alineoj por ke vidvina aŭ orfa linio ne plu estu vidvina aŭ orfa.

Rivero estas tipografia eraro ĉe kiu nedezirata spaco vertikale trairas unu aŭ plurajn alineojn. Evitindas havi spacon kiu *fluas* kiel rivero tra linioj. Ĉi tiu tipografia eraro ne plu estas ofta, ĉar ni ne ofte uzas egalpaŝajn tiparojn, sed proporciajn, sed ĝi ja aperos se oni ripete uzas la samajn frazerajn.

Kvankam tipografiaj eraroj ŝajnas evidantaj kaj

facile kapteblaj, kiam oni devas kontroli centojn da paĝoj, la eraroj ne plu estas tiel evidentaj!

La libro kutime aĉeteblas ĉe arbokadavro.com sed, dum mi verkas ĉi tiun artikolon, okazas striko de la Kanada Poŝta Servo, do, mendo de la libro povus esti neebla nune.

Notoj:

- 1) La gajninto de la konkurso estas Tobiasz Kubisiowski kaj lia traduko estas aĉetebla pro EAB.
- 2) Verkante ĉi tiun artikolon, mi eksciis ke ĉi jare la Braille Institute kreis novan variaĵon de la tiparo Atkinson Hyperlegible Next kiu subtenas ege pli multe da lingvoj, kaj ne plu necesas uzi la neoficialan Lexica Ultralegible.



Pestkuracista emblemo de la “eldonejo”.

Esperanto.ca: vizitu ofte!

Trovi renkontiĝon en via urbo, mendi libron, lerni pri diversaj novaĵoj asociaj kaj aliaj, trovi rimedojn lerni Esperanton — ĉion ĉi kaj pli vi trovos en la retejo de Kanada Esperanto Asocio: esperanto.ca. Vizitu ofte!


Kanada Esperanto-Asocio

[Lerni](#) [Novaĵoj](#) [KEA](#) [Junuloj](#) [Membrec](#) [Eventoj](#) [Klubo](#) [Eldonaĵoj](#) [Biblioteko](#) [Donaci](#) [Kontakti](#) [Komenti](#)

Esperanto



Januaro 2026

LUNDO	MARDO	MERKREDO	ĴAŬDO	VENDREDO	SABATO	DIMANĈO
			1 9:30 pm – 10:30 pm Vankuvera Virutuala Kumziko	2	3	4 1:00 pm – 3:00 pm ♥ Konversacio por komencantoj
5	6	7	8	9	10	11
12	13	14	15	16	17	18 1:00 pm – 3:00 pm EONS Kafejo ☆ ĉiuj niveloj
19	20	21	22	23	24	25 1:00 pm – 3:00 pm EONS Kafejo

Tri noveloj

Timothy Boronczyk

La bona reklamo

“Jen li!” mi aŭdis.

Dum mia vespera promenado, alfrontis min neatendita teamo konsistanta el raportisto kaj fotisto, buĉisto surhavanta sangmakulitan antaŭtukon, kaj du naĝvestitaj virinoj kun granda kartona ĉeko.

“Gratulon, sinjoro Anderson!” gaje salutis la raportisto.

“Pardonu? Mi nomiĝas ...”

La buĉisto interrompis min per vigla manpremo. “Kia lojala kliento! Vi aĉetis la plej grandan kvanton da viando dum la monato ...”

“Sed mi estas veg—”

“... kaj pro tio vi gajnis nian loterion!” li daŭrigis.

La du virinoj staris ambaŭflanke ĉe mi, tenante la ĉekon. Al Felikso Anderson, de Buĉejo Fremont, sume 5000 spesmiroj. Klak! Foto.

Nu, mi nomiĝas Andreo Metzler. Mi estas vegano. Kaj mia edzo, kiu restis hejme, nepre atestus, ke la

belpugulinoj ne interesas min. Sed por 5000 spesmiroj, eble mi pardonu tiujn etajn miskomprenojn.

Post mallonga intervuo, ili (kaj la ĉeko) foriris.

“Kio pri la mono?” mi demandis.

“Estas nek mono nek loterio. Ni scias, ke vi ne estas Anderson,” konfesis la buĉisto. “Sed la legantoj ne scias tion, kaj la gazeta raporto pri la spektaklo estos bona reklamo por la buĉejo.”

La karuselo

La seruro kaj la “NE ENIRU” ŝildo ĉe ĝia pordego ne forbaris Biv de la forlasita foirkampo. Li ofte enŝteliĝis tien por sidi inter la rustiĝintaj lampofostoj, superkreskintaj herbaĉoj kaj rompitaĵoj amuziloj, kaj pensi pri sia kompatinda vivo. Ĉio similis al spegulo de lia malfeliĉo. Hodiaŭ precipe interesis lin la malnova karuselo. Ĝi rememorigis al li epizodon el televida serio, en kiu mistera karuselo transportis la ĉefrolulon tra la tempo al lia juneco. Ho, kia fantazio! Retrovi la

simplecon kaj feliĉon, kiuj ekzistis antaŭ ol li fuŝis sian vivon! Nu... eble... Biv alproksimiĝis al unu el la lignaj ĉevaloj kaj ektenis ĝian iam or-pentritan stangon. La selo ĝemis sub li, kiam li sidiĝis. Li fermis la okulojn.

En la mallumo li imagas la karuselon ekvivanta. Ĝi ekmoviĝas, unue malrapide, poste pli rapide, rondo post rondo. Li sentas venteton sur la vizaĝo dum la brilaj ĉevaloj galopas en sia senfina rondo, kaj la muta kaliopo nun trumpetas melodion, kiun li rekonas de sia infanaĝo. Tiam revenis la silento, kaj ne plu sentebla estis la venteto. Li malfermis la okulojn. Malfeliĉe, li deĉevaliĝis. Nenio ŝanĝiĝis. Ankoraŭ staris la fostoj, la herbaĉoj, kaj la kadukeco. La vivo ankoraŭ doloris lin. Ho, nur se li estus rolulo en televida serio.



La funebro

La pluvo tamburis kontraŭ la preĝejaj fenestroj dum li eniris, forskuante gutojn de sia mantelo, ĝustatempe antaŭ ol la memorservo komenciĝis.

Li sidiĝis sur benkon kaj kondolence kapsalutis al la nigrevestita virino, kiu ekrigardis lin.

Li ne rekonis la aliajn vizaĝojn. Eble ili estis malproksimaj parencoj, preĝejaj amikoj, homoj el la alia vivo de Harold — tiu ekster iliaj ĉiusemajnaj kafumadoj, krucvortenigmaj

bataloj kaj la reciproka sendado de gazetaĵ eltondaĵoj perpoŝte.

Li konis Harold dum dek sep jaroj. Ili renkontiĝis dum komunuma kunsido pri arboplantado, aŭ eble dum poezia vespero? Li ne povis precize memori. Kio gravis estis la postaj jaroj:

renkontiĝoj en la biblioteko, ŝercoj, trankviligaj konsiloj kaj senfina debato ĉu ananaso estu sur pico.

Kiam la pastro petis rememorojn, li ne hezitis.

Li parolis pri la milda humuro de Harold, lia prefero por mirtela jogurto, la fojo kiam ili troviĝis en pluvego kaj Harold insistis marŝi hejmen. “La vetero forĝas la karakteron,” li diris tiam. Ridoj ondis. Homoj viŝis la okulojn. Li finis simple: “Harold ĉiam venis, ĉiun semajnon, dum deksep jaroj.”

Poste, ĉe la gastlibro, alproksimiĝis la vidvino. Ŝia manpremo estis firma, kvankam ĝi iomete tremis.

“Tio estis tre bela,” ŝi diris. “Efektive. Mi ne sciis, ĉu iu el lia pli frua vivo venos.”

“Mi nepre devis,” li diris. “Li tre gravis por mi.”

“Kaj vi diris... ke vi renkontiĝis kun li en la

biblioteko?”

“Jes. En 2009.”



Ŝi hezitis. “Pardonu, sed... Harold nek legis nek iris al bibliotekoj. Ne post la apopleksio en 2004.”

Li sulkigis la brovojn, konfuzite. “Ne... li ĉiam...” Li iomete turniĝis, rigardante la foton sur la fotostablo. La kadrita viro havis la hararanĝon de Harold. Lian sintenon. Sed ne lian rideton. Ne liajn okulojn.

Ŝi sekvis lian rigardon. “Pardonu. Ĉi tiu estas Harold Manning, mia edzo. Eble vi konis alian Harold.”

Li denove rigardis la foton. Poste ŝin. Li volis pardonpeti sed simple diris: “Ankaŭ li gravis,” kaj subskribis la libron.

Ekstere, pli forte falis la pluvo. Li ne malfermis sian ombrelon. Harold estus marŝinta, do ankaŭ li marŝis.

“Kial la plimulto devas defendi la minoritaton, se ĝi volas defendi sin mem?”

*Milito kaj Paco**

Unue, kompreneble, rememorante la citaĵon, atribuitan al la germana pastoro Martin Niemöller (1892–1984). Ĝi ekzistas en pluraj versioj, jen unu el la plej oftaj: «Unue ili venis por la komunistoj, kaj mi silentis — ĉar mi ne estis komunisto. Poste ili venis por la socialdemokratoj, kaj mi silentis — ĉar mi ne estis socialdemokrato. Poste ili venis por la sindikatanoj, kaj mi silentis — ĉar mi ne estis sindikatano. Poste ili venis por la judoj, kaj mi silentis — ĉar mi ne estis judo. Poste ili venis por mi — kaj jam neniu restis por defendi min.»

Due, ĉar la plimulto ne ekzistas, ĝi estas fikcio.

Kiel aspektas la tipa stereotipa reprezentanto de

la plimulto?

Mi elektos nur tiujn ecojn, kiuj sendube apartenas al la superforta plimulto de plenkreskuloj (de 85 ĝis 98 %), kaj en krampoj mi indikos la mezumajn valorojn. Naskita en la lando de loĝado (96 %), ne apartenas al GLAT (90 %). Havas infanojn (85 %), iam estis edziĝinta aŭ edziniĝinta (90 %), ne havas superan klerecon (93 %) kaj ne estas ateisto (93 %). Dekstramano (90 %), konsumas alkoholon laŭ la tradicioj de la lando (85 %). Uzas la interreton almenaŭ foje (94 %), ne havas gravajn mensajn malsanojn (95 %), ne pasigis tempon en malliberejo (95 %).

La proporcio de homoj kun



Martin Niemöller

ĉiuj ĉi tiuj trajtoj impresas. Jen ili, la mezumaj burĝanoj, ĉefa valoro kaj apogo de la mondo, kies interesoj ŝajne estas pli gravaj, ĉar ili estas la “plimulto”. Sed kial mi diris, ke li ne ekzistas?

Ni ne faras sciencajn esplorojn sed nur malgrandan ekzemplon, tial mi supozas, ke ĉiuj ĉi trajtoj estas sendependaj. Kelkaj evidente rilatas inter si (GLAT, infanoj, geedziĝo), sed ne je 100 %, kaj por kompensi la malprecizecon mi prenis la suprajn limojn de la procentoj.

Do, kia estas la probableco, ke homo havas ĉiujn ecojn de la plimulto?

$P = 0,96 \times 0,90 \times 0,85 \times 0,90 \times 0,90 \times 0,93 \times 0,93 \times 0,90 \times 0,85 \times 0,94 \times 0,95 \times 0,95 \approx 33 \%$.

Eĉ se oni konsideras la rilatojn inter faktoroj kaj prenas maksimume “optimisman” scenaron, ni ricevas ne plimulton, sed ĉirkaŭ trionon. Se al vi ŝajnas, ke ekzemple GLAT kaj geedziĝo donas tro fortan korelacion, ni forigu la trajton “geedziĝo”. Tiam la probableco renkonti homon kun ĉiuj trajtoj de la plimulto fariĝos pli alta kaj estos 37 %. Sed ankaŭ tio estas malpli ol duono.

Do la nombro de homoj apartenantaj al la plimulto mem estas minoritato, kaj la cirklo fermiĝas.

Kaj se eĉ la “mezuma burĝano” troviĝas malpli ofte ol ĉiu tria, kiel principe diferencas la bezono defendi la rajtojn konservi reproduktivajn funkciojn de ĉiu mila infano, naskiĝanta kun tiel evidentaj trajtoj de ambaŭ seksoj, ke oni ne povas enmeti lin aŭ ŝin en la dikotomion viro–virino, de bezono rekoni pli oftajn sed apenaŭ tion vive signifajn rajtojn?

Se ni ĉiam parolas pri minoritato kaj neniam povas paroli nome de neekzistanta plimulto, verŝajne ni bezonas aliajn kriteriojn de graveco. Ankoraŭ unu ne tiom evidenta avantaĝo de la defendo de klaraj minoritatoj estas, ke tio igas homojn pli toleremaj, ankaŭ al aliaj diferencoj. Tial se vi iomete malsimilas al la “plimulto” sed volas esti plene integra parto de la komunumo, memoru: la akcepto de aliaj ecoj estas socia kapablo, kiu bridas nian praulan timon antaŭ fremduloj. Kaj tio signifas, ke kiam oni defendas la rajton de minoritato ekzisti, oni samtempe defendas ankaŭ vian rajton resti vi mem — eĉ se via diferenco estas nur tio, ke vi havas nekutiman hobion, alian harkoloron, apartan tagritmon aŭ simple ne ŝatas picon kaj futbalon.

*** Milito kaj Paco estas plumnomo de verkintoj**

Mortpafita renaskiĝo

Viktor Pajuk

Dum la periodo de 1921 ĝis 1931, en Ukrainio okazis eksplodo de ĝia kulturo kaj ĝiaj reprezentantoj. Ekzemple, je la 1-a de oktobro 1925, en Ukrainio estis 5 000 verkistoj.

Kompreneble, tio ne povis resti nerimarkita de la sovetaj aŭtoritatoj, kiuj bone komprenis, ke tia kresko kondukus al la fortigo de la ideologia fundamento en Ukrainio, sur kiu baziĝas la nacio. La kulturo de kiu ajn lando estas ĉefe la jenaj du komponantoj: historio kaj lingvo, kiuj estas la du principoj, sur kiuj kuŝas la fundamentoj de la reviviĝo de la nacio. Kompreneble, la Rusia Imperio, kvankam

kaŝita sub alia nomo (Sovetunio), restis imperio, kaj ĝi neniam permesus, ke ties “kolonio”, kiun ĝi ĉiam konsideris Ukrainio, eskapu el-sub ĝia kontrolo. Tial en la kaverno de la imperia “besto”,

je la plej alta nivelo, oni decidis detrui tiujn ĝermojn de sendependeco kaj memstareco. Por tiu celo oni komencis produkti falsajn akuzojn, elpensi kaj starigi “krimajn” kazojn kontraŭ reprezentantoj de la ukraina kulturo.

La komenco de la amasa ekstermado de la ukraina intelektularo estas konsiderata 12-13-an de majo 1933, kiam okazis la aresto de Miĥajlo Jalovij kaj la sinmortigo de Mikola



Karikaturo de Jurij Zhuravel (Юрій Журавель), ukraina pentristo kaj muzikisto — kun permeso uzi. Estas ilustrita fakto el la vivo de kapitano Matvejev, de NKVD (antaŭulo de KGB), kiu uzis unu kuglon por mortpafi du prizonulojn.

Ĥvilovij en la Ĥarkiva loĝdomo de verkistoj
“Slovo” (Vorto).

La semajno de la 27-a de oktobro ĝis la 4-a de novembro 1937 estis la kulmino de la krimaj agoj de la sovetia subprema reĝimo, kiam 1 111 politikaj malliberuloj de la Soloveca tendaro estis ekstermitaj. Inter la viktimoj de tiu ĉi tragika evento estis elstaraj reprezentantoj de la spirita, kultura, literatura kaj arta generacio de Ukrainio de la 1920-aj jaroj, kiu nomiĝis la “Mortpafita Renaskiĝo” (aŭ Ruĝa Renesanco). La bolŝevistoj fizike detruis preskaŭ la tutan floron kaj la tutan

eliton de la ukraina intelektularo – verkistojn, poetojn, scenaristojn, artistojn, skulptistojn, sciencistojn, reĝisorojn, historiistojn...

Samtempe, la “kulpo” de la vasta plimulto de la mortigitaj homoj estis nur tio, ke ili estis ukrainoj kaj verkis en la ukraina lingvo, agante kiel portantoj de la ukraina pensmaniero.

Kremla putino ankoraŭ ne povas trankviliĝi, asertante, ke Ukrainio estas artefarita formaĵo inventita de Lenin, kaj la ukraina lingvo tute ne ekzistas – ĝi estas nur sudrusa dialekto de la grandrusa lingvo.

Klim Poliŝĉuk (1891 – 1937)

Klim Polishchuk (1891, Krasnopil, Volina provinco – † 3-a de novembro 1937, Sandarmoĥo, Sovetrusio) estis ukraina verkisto, publicisto, aŭtoro de historiaj romanoj el la periodo de la Mortpafita Renaskiĝo. Esploristo de la kulturo de la komioj (finn-ugra popolo). Li studis en Sankt-Peterburgo, en 1912 li revenis al Ĥitomiro (Ukrainio), kie en aŭgusto 1914 li estis arestita pro “naciisma” agado kaj ekzilita ekster Ukrainio. En 1924, Klim Poliŝĉuk kaj lia edzino revenis al la Soveta Ukrainio, kiu tiutempe jam estis parto de USSR. La verkisto laboris en ŝtata eldonejo, publikigante en periodaĵoj plejparte prozon. Kritikistoj atribuas la verkojn de Poliŝĉuk al simbolismo kaj gotika skribo.

Li estis arestita la 4-an de novembro 1929, kaj en januaro 1930 laŭ decido de la estraro de la GPU* de Sovetunio li estis kondamnita laŭ la Krima Kodo – 10 jaroj da malliberigo en koncentrejoj (en la sama 1930, la edzino Halina estis arestita kaj ekzilita al Kazaĥio). Li servis sian punon en la koncentrejo Karlag (4 jaroj) kaj sur la Solovecaj insuloj. Per rezolucio de aparta triopo de la NKVD*, la 9-an de oktobro 1937, li ricevis la plej altan punon (pafekzekuto). Li estis rehabilitita la 14-an de aprilo 1992.

**GPU, NKVD, KGB – antaŭaj nomoj de FSB de RF (Federala sekreta servo de Rusujo)*

Malnova ikono

De notlibro

Klim Poliŝĉuk

En la aero aŭdiĝis susuro... Printempo alproksimiĝis... Io fajra perturbis mian animon kaj maltrankviligis mian koron... Iom post iom, entuziasmo por la batalo kontraŭ la “malamikoj de la popolo” ekestis anstataŭigita de indiferento al la ĉirkaŭo, krom tio, kio tiel potence susuris en la aero... La urbaj stratoj estis makulitaj per freŝa homa sango, kaj terure mutilitaj kadavroj kuŝis sur la trotuaroj. La vivo fariĝis neeblo de tago al tago, kaj la pacaj loĝantoj sovaĝadis kaj similis al ferocaj malamikoj de ĉio bela, ekscita, ideologia.

Kaŝinte en keloj de la detruaj armiloj flugantaj de la kampo, ili vivis per teruraj rakontoj kaj legendoj pri la lukto, kiu furiozis sur la stratoj de la urbo kaj kun ioma malespero malbenis la ĉielon kaj la teron.

En iliaj grandaj timigitaj okuloj brilis io abomeninda kaj senvalora kaj, rigardante ilian malbonbestan teruron, mi volis forkuri ien malproksimen, kie oni ne aŭdus iliajn enuajn plendojn, kie oni ne vidus iliajn sensencajn

timigitajn okulojn, en kiuj tiel malkaŝe lumis la lumoj de kaŝita malico.

Je la tagiĝo iun tagon mi ĉirkaŭiradis per modere malrapida paŝo la sangoflakojn kaj provis eliri el la sorĉita cirklo de malico kaj ruiniĝo. Ĉe la angulo de du grandaj stratoj mi devis resti iom da tempo, ĉar ĉi tie iu “mortigis” iun, kaj tial mi devis “esprimi” mian “malamon” al tiu, kiu kuŝis en la sango, per tio forigante la eblecon de ajna suspekto kaj feliĉe eliri el la urbo.

La blanka pavimo glatstrie etendiĝis en la malproksiman arbaron, kaj super ĝi per laŭtaj sonoriloj sonis kantoj de printempaj alaŭdoj. Sur la kampoj oni povis vidi grizajn militpaltojn, kiuj hastis foriri kaj kaŝi sin ie. Rigardante ilin, venis al mia menso la vortoj de la Unua Universallo: “De nun nur ni kreos niajn proprajn vivojn...”

Ili kreis... Ili kuris kiel fuĝantoj, ne sciante kien... Teruro de la lukto de la granda urbo disfluis ĉie kaj ĉien. Ĉiu persono perdis la certecon pri sia vivo kaj penis esti si mem, aŭ kiel ŝafoj antaŭ la ŝtormo, ili



Ukraina ĥato, pentrita de Ilja Repin, 1880

kunfluis en unu gregon kaj tiam ilia izola hororo kunfandiĝas en unu lokon kaj kreis vizaĝon de la tempo.

Kadavroj de kamparanoj kuŝis en vojflankaj fosaĵoj. Sangigitaj, senvestitaj kaj nudpiedaj, ili kuŝis trankvile kaj ilia aspekto elvokis en mia animo la rememorojn pri la sangaj kampoj de la pasinta milito. La sama neesprimebla sopiro en la mortaj okuloj de la murditoj, la sama obstineco en iliaj dikaj piedfingroj sur la nudaj piedoj. Mi ne scias, kial, mi ankoraŭ ne povas trankvile rigardi la grandfingrojn sur miaj piedoj, sed mi bone scias, ke la piedfingroj de kamparanaj kadavroj impresis min pli ol iliaj nemoveble mortaj okuloj...

La kantado de printempaj alaŭdoj ektrankviliĝis. Milda krepusko ruliĝis tra la kampoj kaj ie en la malproksimo aŭdiĝis la tremantaj sonoj de

kanonpafado, kiujn ŝajnis atente aŭskultis la malhelblua strio de pinarbaroj etendiĝantaj en la fora horizonto.

Rajdanto sur la griza ĉevalo kuratingis min. Li atente rigardis mian vizaĝon kaj subite frapis sian ĉevalon sub la flankojn per la kalkanoj kaj ventege reflugis.

Surprizita de la konduto de la nekonata rajdanto, mi haltis kaj rememoris, ke jam estas tempo serĉi ie iun ŝirmejon por la tranokto.

Jam estis tute mallume, kiam mi eniris ĥaton starantan tuj ĉe la vojo. La dommastro, alta, maldika viro kun nigra barbo kaj severa vizaĝo, rigardis min ne tre plezure: “Ĉiuj friponoj rampaĉas ĉi tie... ili suĉadis ŝviton kaj sangon, sed nun ili forfuĝas...”

La insulto ŝprucis mian vizaĝon per varmega akvo, sed mi provis regi min kaj diris trankvile:

– Vi eraras, se vi pensas, ke mi estas tiu, kiu ŝviton kaj sangon suĉadis... Mi estas same kiel vi, ordinara kamparano.

La mastro faris du paŝojn malantaŭen de mi, mezuris min per sia explorema rigardo kaj murmuris ion nekompreneblan.

Vidante ĉi tiun sintenon de la mastro, mi volis forlasi la domon, sed li haltigis min ĉe la sojlo:

– Kien vi tra la nokto? Kadavroj estas ĉie... Dankon al Dio, ni ja estas kristanoj!... Pli bone restu.....

Mi silente revenis, sidis sur la benko kaj ĉirkaŭrigardis la ĥaton. Ĝi estas ampleksa kaj pura, kiel okazas ĉe pli riĉaj posedantoj. Ĝi estis dividita en du duonojn: kuirejo kaj “pura” ĥato, kie estis tablo, lito anstataŭ surplanka kuŝejo, granda ŝranko kun vitraj pordetoj, tra kiu oni povis vidi bele ornamitajn bovlojn kaj telerojn

Terura laceco sentiĝis, kaj mi volis kiel eble plej baldaŭ kuŝi kaj ripozi. Demetinte mian mantelon, mi ekklinis super la benko, sed la mastro diris:

– Ne, estas pli bone ne kuŝi ĉi tie... La ĥato estas tuj ĉe la vojo, do tiuj, de kiuj vi fuĝas, povas veni ĉiumomente.

– Sed mi ne forkuras de iu ajn... Mi okupiĝas pri miaj propraj aferoj, respondis mi.

– Tio estas via afero. Sed mi devas kaŝi vin ie por la nokto, ĉar tiam mi estas en danĝero... Pli bone sekvu min en la duan domparton tra la vestiblo kaj tie vi kuŝiĝos por ripozi trankvile.

Mi ne scias, kial mi rememoris la mirindan rajdanton, kiu trafis min sur la kampo, kaj ŝajnis al mi, ke estas io komuna inter tiu rajdisto kaj ĉi tiu

mastro. Mi hezitis dum kelkaj minutoj, ne sciante kion fari, kaj poste leviĝis kaj sekvis lin.

Mantenante la kandelon, li kondukis min ĉu al alia domparto aŭ al iu provizejo, kaj diris:

– Vi povas kuŝi sur la lignan kuŝejon ĉe la forno, sed ne forgesu estingi la lanternon. Dormu trankvile ĝis la mateno, kaj nun mi enŝlosos vin, por ke ne estu suspektoj.

Antaŭ ol mi povis diri vorton, li klakfrapis la pordon kaj mi aŭdis la pordseruran tinton. Kurante al la pordo, mi kriis:

– Mastro! Mi ja devas ellitiĝi frue!

– Bone, bone! – aŭdiĝis la obtuza voĉo de la mastro.

Restinte sola, mi komencis ĉirkaŭrigardi la loĝejon. Ĝi estis provizejo kun unu fenestreto kaj la sama forno, apud kiu staris malnova sofo kaj tablo.


Pli laŭlonge de la muroj staris du ferforĝitaj kestoj kaj unu malplena bareleto, malantaŭ kiu staris granda, malnova, ligna ikono de iu nekonata sanktulo premita kontraŭ la muro. Laŭ mia kutimo, mi ekzamenis ĝin kun intereso, sed kiam mi volis eltiri ikonon pli proksimen al la lumo, ĝi, kvazaŭ ĉenita, eĉ ne moviĝis de sia loko. Tiam mi prenis la lanternon kaj, metinte ĝin sur la plankon,

komencis forpuŝi la bareleton, pensante, ke estas ĝi, kiu premis ikonon kontraŭ la muro.

Flankenpuŝante la malplenan bareleton, mi denove prenis la ikonon, sed ĝi ankoraŭ ne moviĝis. Lumigante la lanternon ĉirkaŭ ĝi, mi vidis, ke la ikono estas kvazaŭ alĝustigita al la muro, kio denove rememorigis al mi la strangan rajdanton sur la kampo kaj la strangan konduton de la mastro.

Tiam, mansvingante, mi rulis la bareleton al sia loko, prenis la lanternon kaj iris al la kuŝejo kun la certa intenco ekdormi.

Mi kuŝiĝis kaj ekdormis en profunda koŝmara dormo. Mi songis, ke iu venas kaj vekas la mastron. La mastro ŝajnas aŭdi lin frapi la pordon kaj fenestrojn, sed li silentas kaj ne respondas. Tiam veninto laŭte ekblasfemas kaj ekkrias, ke la mastro diru, kiun li kaŝas en sia provizejo. La mastro ne reeĥas. Tiam io ekgrumblis sub la domo kaj ekbatis kontraŭ la muro, kie staris la malnova bildo de nekonata sanktulo. Komence la muro ne cedis, sed poste ĝi ekkraakis kaj parto de ĝi, kune kun la ikono, iom post iom ekpuŝigis la barelon. La barelo kliniĝis, falis flanken kaj la



ikono iel moviĝis antaŭen for de la muro, en la muro aperis nigra truo, el kiu aperis du paroj da sangaj mortintaj kruroj, kun la grandaj piedfingroj, kies finoj estis nigraj kaj ŝveliĝintaj. La kruroj antaŭenpuŝis kaj etendiĝis al mi. Malvarma ŝvito

kovris mian frunton, mia hararo hardiĝis pro la timo, mi ekkriis per malpropra voĉo kaj vekiĝis...

Estis kviete. Tra malgranda fenestro brilis ĉifona luno, kaj ie malproksime kriis kokoj. Mia korpo tiel rigidiĝis, ke mi apenaŭ povis leviĝi por ekbruligi la lanternon. Ekbruliginte la lanternon, mi ekbruligis cigaredon kaj, rigardante la malhelan vizaĝon de iu nekonata sanktulo elrigardanta de-malantaŭ la bareleto, mi ial ekcerbumis...

Helbluaj fadenoj de tabaka fumo disvastiĝis ĉirkaŭ mi, kandelao kviete kraketis en la lanterno, kaj mi sidis kaj atendis la matenon. Subite miaj pensoj estis interrompitaj de iu perturba sono.

Aŭskultante, mi aŭdis iun flustradon en la vestiblo. Flustris duopo:

— Ĉu vi aŭdas? Mi diras al vi, ke vi lasu ĝin! flustretis iu virina voĉo.

– Foriru! Mi scias, kion mi faras! – flustras la dua, vira voĉo.

Mi streĉe komencas aŭskulti kaj la cigaredo falas el miaj manoj.

– Sangosuĉulo, –flustretas la unua voĉo denove.

– For! – iu ekkriegis tra la tuta vestiblo kaj dum momento ĉio silentiĝis.

La klinko kviete bruis kaj iu prenis la seruron.

Mi ekstaris kaj kuris al la fenestreto. Post unu minuto, mi disbatis ĝin per la pugnoj kaj, forsaltante en la korton, ekforkuris en la silentajn kampojn. Mi memoras, ke mi kuris orienten, ĉar la aŭroro brilis antaŭ mi dum la tuta tempo.

Mi rekonsciiĝis nur kiam la matena frosto komencis tro mordi miajn orelojn kaj manojn. Mi haltis momenton por ripozi kaj rememoris, ke mi lasis mian palton tie, kaj en la palto estis la tuta mono, per kiu mi esperis veni al mia vilaĝo.

Elĉerpita kaj malsata, mi sidiĝis ĉe la kamplimo kaj, aŭskultante la matenan kanton de alaŭdoj, rigardis la leviĝantan sunon...

Proksimume unu monaton poste mi estis denove sur la sama vojo. Kun renovigitaj esperoj, mi revenis al mia malnova loko en la kruelan urbon.

Ĉirkaŭe buntis printempo, la beleco de la tero impresis, paco kviete disvastiĝis sur la kamparo. Iom post iom, la aferoj trankviliĝis, kaj la nigraj sulkoj estis zorge kombitaj per erpiloj. La unua printempo de libera laboro sonoris per milkorda melodio kaj flugiligis la kamparanajn animojn per la kuraĝa flugo de antikvaj esperoj pri eterna harmonio sur la sia tero.

Ambaŭflanke de la vojo tremis la zumado de la kamparan'voĉoj. Forĵetinte siajn varmajn mantelojn, en nur blankaj ĉemizoj, ili decide paŝis laŭ la sulko kaj, semante la helan grenon sur la nigran kampon, gaje babilis inter si.

Miaj zorgoj malaperis kun la nebuloj kaj kun trankvila ĝojo en la animo mi alproksimiĝis al la urbo. Du miaj amikoj sidis apud mi en la ĉaro, kiuj, kiel mi, dum la tuta monato suferis malfacilaĵojn tra la voliniaj* vojoj kaj la polesiaj* marĉoj (partoj de Ukrainio — Red.). La pasinteco ŝajnis koŝmaro, nenio pli.

Je la dekoka versto (mezuro de distanco — Red.) de la urbo, min atentigis la ruinoj de forbruligita kabano, el kiu restis nur unu alta kamentubo kaj duonfalintaj muroj. Traflugis tra mia kapo penso – memoro pri la nokto, kiun mi tiel maltrankvile pasigis sub la negastama tegmento de la vojrandata ĥato. Mi ekrigardis la ĉirkaŭaĵon kun intereso kaj

ekmemoris, ke ĉi tiu estas la sama domo, kie mi pasigis tiel maltrankvilan nokton.

Ĉe la alia vojflanko, la kamparano erpilis la kampon. Haltigante la ĉaron, mi demandis lin:

– Vi ne scias kial ĉi tiu domo brulis?

– Ĝi forbrulis pro la Dia graco, – li respondis.

– Kiel estis tiel?

– Jen tiel! Tie loĝis ĉevalŝtelisto kaj rabisto. Li ŝajnigis esti honesta kaj pia...

– Li eĉ starigis por si ĥaton kun unu fenestreto por preĝado, sed nenio helpis... Oni kaptis lin...

– Kiel tio ĉi okazis? – mi demandis denove.

Tute hazarde, – respondis la kamparano. – Iu nigra hajdamako* eniris por la tranokto, sed antaŭ ol li ekdormis bone, la posedanto atakis lin per tranĉilo kaj volis mortigi lin. La hajdamako estis forta viro kaj iel sukcesis forkuri. Sed, eskapinte el la manoj de la rabisto, li ne pardonis lin, kaj du tagojn poste la tuta taĉmento ekrajdis ĉi tien. La posedanto forkuris ien, sed lia edzino devis pagi pro ĉio. Kiam oni komencis pridemandi ŝin ĉiudirekte, ŝi rakontis pri ĉio... Ŝi eĉ rakontis pri la malnova ikono, kiu estis en la dometo...

– Kiu ikono? – el mia brusto eskapis surprizita demando. – Eble tiu, kiu staris en dometo

malantaŭ malplena bareleto?

– Jes, la sama!... Kaj kiel vi scias? – demandis la kamparano.

– Mi iam aŭdis okaze, – mi diris.

– Hm... do tiu ikono estis firme fiksita al la muro kaj baris la enirejon al la sekreta kelo, kie troviĝis eĉ du nudaj kadavroj.

La haŭto sur miaj ŝultroj anseriĝis, kaj fulmis penso en la kapo:

– Evidentiĝas, ke mi tiam ne vane forkuris... La animo mem eksentis la danĝeron kaj vekis la korpon ĝustatempe, por ke ĝi povu savi sian vivon.

Adiaŭinte la kamparanon, ni veturis plu. Proksimiĝinte al la urbo, mi rakontis pri mia aventuro al miaj amikoj, vojaĝantoj kun mi, sed ili rifuzis kredi min pro tio, ke mi estas “ĝisosta elpensanto”...

Eble, post iom da tempo mi mem ne kredos, ke tiel vere okazis, sed nun la rememoroj pri miaj suferajoj estas ankoraŭ sufiĉe freŝaj.

1919. 25/II, Kijivo

** hajdamako – sodato de la Ukrainia Popola Respubliko dum moskovia-ukrainia milito (1917-21); nigra, pro la uniform, kiun ili portis*

Partoprenu en Belartaj Konkursoj de UEA!

Geamikoj, en nia alvoko al partopreno en BK-2024 ni esprimis nian fortan surprizon pro tio, ke ni ricevis nur 110 konkursaĵojn. Temas pri 70 verkoj malpli ol en 2023; 63 malpli ol en 2022 kaj 76 malpli ol en la rekorda jaro 2021. Nu, en 2025 la partopreno en BK iel rekaptis la averaĝan pulson de la lastaj jaroj. Oni ricevis 163 konkursaĵojn, nome 53 verkojn pli ol en 2024, 10 malpli ol en 2022, 12 pli ol en 2020 ktp. Krome, ili venis el la kvin kontinentoj kaj ilia averaĝa kvalito estis pli ol estiminda. Se paroli nur pri la branĉo “Teatraĵo”, en 2024, la unusola verko ĉi-branĉe konkursinta ricevis la trian premion; en 2025, tamen, estis aljuĝitaj la tri ĉefaj premioj plus unu honora mencio. Aparte gravas kaj rimarkindas la ĉi-branĉa aljuĝo de la unua premio, se oni konsideras la fakton, ke, en la lastaj 25 jaroj, tio realiĝis en nur 4 okazoj. Cetere, en BK-2026 la subbranĉo “Monologo aŭ Skeĉo” transiĝas al la kategoria branĉo sub la nomo “Mallonga Teatraĵo (monologo, skeĉo ktp)”.

Aliflanke, en BK-2026, ni enkondukas la subbranĉon “Sciencfikcio kaj Fantasto”, kies unua premio havas la nomon “Premio Charles Power”, omaĝe al la samnoma iama Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, verkisto, tradukisto kaj ŝatanto

de scienco kaj sciencfikcio, kiu forpasis en aprilo 2025.

Niaflanke, kiel kutime, ni fidis la altirpovon de BK, la plej prestiĝa el la literaturaj konkursoj en Esperantujo, en kiu kutime partoprenas tiel grandaj figuroj de la E-beletro kiel entuziasmaj talentaj komencantoj sur la literatura tereno. Laŭlonge de la historio de BK, tiessine ŝprucis elstaraj individuaj kultivantoj de la E-literaturo kaj propralume brilaj grupoj el ili, kiuj nepre famiĝis. Pro ĉio ĉi, kaj pro multaj aliaj bonoj, ni esperas, ke la partopreno en BK-2026 tenos sin kvante kaj kvalite altnivela kaj eĉ atingos iun aŭ kelkajn el la de ĝi spertitaj lastatempaj eksterordinaraj rekordoj. Ek do al konkursad’!!!

La rezultojn oni anoncos kadre de la 111a Universala Kongreso de Esperanto en Graz (Aŭstrio). Kiel kutime, partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al aliĝo al la UK. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, krom en la branĉo Infanlibro de la Jaro. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo aŭ subbranĉo. Endas sekvi jenajn regulojn:

Poezio: maksimuma longo ne fiksitaj.

Prozo: maksimuma longo 200 x 65 karaktroj (kvino da paĝoj).

Mikronovelo: (maksimuma longo 100 vortoj). La unua premio nomiĝas Premio Paula Adúriz.

Sciencfikcio kaj Fantasto: maksimuma longo 200 x 65 karaktroj (kvino da paĝoj). La unua premio nomiĝas Premio Charles Power.

Teatraĵo: maksimuma longo ne fiksita.

Mallonga teatraĵo (monologo, skeĉo, unuaktaĵo ktp): (daŭro inter 10 kaj 15 minutoj). La unua premio nomiĝas Premio María Cuevas.

Eseo: teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo, proksimuma longo 400 x 65 karaktroj (deko da paĝoj). La unua premio nomiĝas Premio Luigi Minnaja.

Infanlibro de la Jaro: originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2024. Aljuĝata estas nur unu premio.

Kantoteksto: maksimuma longo ne fiksita.

La absoluta limdato por ricevo de konkursaĵoj estas la 31a de marto 2026.

Oni sendu po unu tajpitan ekzempleron de ĉiu konkursaĵo – krom en la branĉo Infanlibro – al Belartaj Konkursoj de UEA, ĉe Miguel Gutiérrez Adúriz, prefere retpoŝte al unu el jenaj

adresoj: belartajkonkursoj@gmail.com; bk@co.uea.org; aŭ, se tio ne eblas, papere al la adreso: los Coterros 1-C, 2 Izda, 390600 Muriedas; Cantabria; Hispanio, indikante la elektitan pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro. Por la branĉo Infanlibro oni sendu unu ekzempleron de la koncerna libro al la adreso de Miguel Gutiérrez Adúriz kaj tri ekzemplerojn al Ionel Oneţ, Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Premioj: En la branĉoj Poezio, Prozo, Teatraĵo kaj Eseo, kaj en la subbranĉo Sciencfikcio kaj fantasto: unua premio 260 €, dua premio 182 €, tria premio 104 €. En la branĉo Infanlibro de la Jaro 546 €. En la branĉoj Mikronovelo, Kantoteksto kaj Mallonga teatraĵo (monologo, skeĉo, unuaktaĵo ktp): unua premio 100 €, dua premio 25 €, tria premio 25 €. Cetere, la teksto ricevinta la unuan premion en la branĉo Kantoteksto estos muzikigita, kaj la rezulta kanto estos diskonigita en ludado fare de kantisto aŭ kantogrupo.

Detala regularo: esperanto.net/literaturo/bk/index.html

Miguel Gutiérrez Adúriz,
Sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA

Renkontiĝoj tra Kanado en 2025 — ĉeestu!

Nia komunumo estas vigla tra la lando. Partoprenu! Ĉeestu renkontiĝon en via urbo. Se ne eblas, multaj monataj eventoj okazas virtuale... kaj ili bonvenigas novajn partoprenantojn de aliaj partoj de Kanado! Vizitu diversajn eventojn tra la lando ĉiumonate, kaj konatiĝu kun viaj samideanoj. Ni kuniĝu tra Kanado!

Viktorio: *Kafejo de Ideoj (Zoom)*. Ĉiun sabaton, 9:00 PT. eventaservo.org/o/ViktoriaEsperanto

Vankuvero: *Kultura Kumziko (Zoom)*. La unuan jaŭdon monate, 18:30 PT. eventaservo.org/o/EO-Vankuvero

Vankuvera Renkontiĝo. La trian jaŭdon monate, 18:30 PT. meetup.com/vancouver-esperanto/

Alberto: *Kunvenu! (Zoom)*. Ĉiun mardon, 19:00 MT, eventaservo.org/o/Esperanto-Alberta

EO-Prerioj: *Kumziko (Zoom)*. La trian merkredon monate, 19:00 CT. eventaservo.org/o/EO-Prerioj

NOEL: *Ni babilu! (Zoom)*. Ĉiun trian vendredon monate, 19:00 ET. northernesperanto.blogspot.com

Toronto: *Socia Kunveno*. La unuan merkredon monate, 18:00 ET (Loblaws Carlton St - Maple

Leaf Gardens); poste restoracio je la 19h30.

eventaservo.org/o/EO_TOR

Toronto *Konversacio por komencantoj (Jitsi)*. Ĉiun dimanĉon, 13:00 ET. eventaservo.org/o/EO_TOR

Kitchener-Waterloo & Hamilton(kiel Toronto)

Londono: *Neformala posttagmezo de amuzo kaj konversacio*. Ĉiusembe, 12:00 ET (Tim's, Wellington Rd) meetup.com/Esperanto-London/

Otavo: *Konversacia Rondo Tutmonda (Jitsi Meet)*. Lastan jaŭdon ĉiumonate, 19:00 ET. eventaservo.org/o/Esperanto-Otavo

Montrealo: *Ni parolu!* La duan kaj la lastan vendredon ĉiumonate, 18:00 ET (Resto VeGo, rue St-Denis). eventaservo.org/o/ESK

Nov-Skotio *Videkunveno (Zoom)*. Ĉiun dimanĉon, 11:00 AT kun Ĉikago. eventaservo.org/o/EO_Nov-Skotio

Halifakso: *Esperanto-Kafejo*. La trian dimanĉon ĉiumonate (detaloj: [Esperanto Nov-Skotio | Meetup](https://esperanto-nov-skotio-meetup.com) | eventaservo.org/o/EO_Nov-Skotio)

Demandoj? Aldonoj al tiu listo? Skribu al informo@esperanto.ca

Kanada Esperanto-Asocio

La estraranoj de KEA dum 2026–2027:

- Prezidanto: Geoffrey Greatrex — Otavo ON
- Kasisto: Jordan Zero — Newmarket ON
- Sekretario: Bob Williamson — Halifakso NS
- Estrarano: John Huang, Mississauga ON
- Redaktoro: Garry Evans — Montrealo QC
- Estrarano: Ĵenja Amis — Montrealo QC
- Estrarano: Andrew (Andreo) Sly — Viktorio BK
- Estrarano: Luis Obando — Revelstoke BK
- Estrarano: Trefleo Mercier — Ŝerbruko QC

Adreso:

198 Banbrooke Cres Newmarket, Ontario
L3X 2W6

Retejo: <https://esperanto.ca/>

Facebook: [facebook.com/
KanadaEsperantoAsocio](https://facebook.com/KanadaEsperantoAsocio)

YouTube: [youtube.com/channel/
UCVBXZyk2N436ot4qlug-2ng](https://youtube.com/channel/UCVBXZyk2N436ot4qlug-2ng)

Lumo

Redaktoro: Ĵenja Amis. **Provlegistoj kaj helpantoj:** Bob Williamson, Francisko Lorrain, Sylvain Auclair, Trefleo Mercier. **Fotoj (plejparte):** John Huang

Esperanto-Societo Kebekia

La estraranoj de ESK dum 2026–2027:

- Prezidanto: Normand Fleury
- Vic-prezidanto: Rafael Scapin
- Kasisto: Garry Evans
- Sekretario: Sylvain Auclair
- Estrarano: Joel Amis

Adreso:

Société québécoise d'espéranto
6595 rue Briand, Montréal (Québec) H4E 3L4,
Kanado

Retejo: www.esperanto.qc.ca/

Facebook: [www.facebook.com/
EsperantoQuebec](https://www.facebook.com/EsperantoQuebec)

Pasporta Servo

Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi: www.pasportaservo.org.

Vi povas ankaŭ kontakti Jed-on Meltzer
<jedmeltzer@gmail.com>, kiu estas la peranto
por Kanado. **Estu la nova peranto de PS!**